

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



Sur la „Kastelmonto“, Homburg/Saar
(urbo de la nunjara TEJO-Kongreso)

N-ro 630 (5)

Majo 1958

**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

esperanto

MAJO 1958

51 a JARO

REVUO INTERNACIA N-RO 630 (5)

Fondinto: H. HODLER

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro:
MAG. W. AULD, Knockfarril, Thornside Road, Johnstone,
Renfrewshire, Skotlando.

Cion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Girkonto: 378964
Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1958): 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld
 $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estrarano de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Birstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.
Telefono: ARNold 90-81.

Enhavo

Decidoj de la printempa estrara kunsido	77
En Mainz apud la bela Rejno	78
Arto en la lernejoj. <i>Jan Schaap, jr.</i>	80
Novaj fortoj en la gazetaro	90

Rubrikoj

CED	79
Novaj libroj	81
La Juna Vivo	85
Tra la mondo	87
Koresponda Servo Mondskala	90
43a U.K.	91
La internaciaj konkursoj	91
Radio	91
Oficiala informilo	92

Manuskripto por „Esperanto” devas esti klare taj-pitaj sur unu flanko de la folioj, kun interlinia spaco, en perfekta Esperanto kaj en du ekzempleroj. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

DECIDOJ DE LA PRINTEMPA ESTRARA KUNSIDO

Inter la 11-a kaj 13-a de aprilo 1958 okazis en la Centra Oficejo de U.E.A. en Rotterdam, la kutima printempa kunsido de la Estraro. La kunsidojn ĉeestis la Prezidanto Prof. D-ro G. Canuto, la Vic-Prezidanto S-ro H. W. Holmes, la Ĝenerala Sekretario Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj S-ro R. Llech—Walter. Krome ĉeestis ankaŭ la Direktorino de la Centra Oficejo, F-ino M. H. Vermaas, la Redaktoro de la Revuo, S-ro W. Auld kaj la K.K.S., S-ro Gian Carlo Fighiera. D-ro W. Herrmann ne povis ĉeesti la kunsidojn pro malsano, dum Ing. G. Azzi telegrame anoncis, ke li ne povis veni pro grava profesia laboro. La kunsidojn prezidis Prof. Canuto.

La Estraro antaŭ ĉio konstatis ke ekde la Kongreso en Marseille estas entute faritaj 17 skribaj decidoj. La Estraranoj interŝanĝis skribajn raportojn. La kunsido tiam ekzamenis la raporton de la Estraro, kiun kunmetis la Ĝenerala Sekretario, kaj fiksas la definitivan tekston. Ĝi estos, kompreneble, submetita al la Komitato en Mainz kaj presita, kiel kutime, en la jarlibro de U.E.A. Ankaŭ en la pasinta jaro estas konstatitaj konsiderindaj progresoj:

Per Reĝa Dekreto No. 49 de la 22-a de marto 1958 U.E.A. ricevis juran personecon. Tiamaniere, post multaj jaroj, U.E.A. denove fariĝis jura subjekto. La decido de la Komitato, ke T.E.J.O. fariĝu sekcio de U.E.A., donis tre kontentigajn rezultojn. Formiĝis pluraj naciaj sekcioj. La junulara konferenco en Mainz tre bone sukcesis. Entute oni rimarkas vigliĝon de la movado en la junularaj medioj.

La Universala Kongreso en Marseille, kvankam laŭ la nombro de ĉeestintoj estis meze vizitita, tamen laŭ sia karaktero estis unu el la plej elstaraj kongresoj. La financa efiko estas ankaŭ tre kontentiga. Ne nur, ke estas evitita ĉia deficitio, sed, male, la finaj kontoj, ĵus prezentitaj al la Estraro, montras belan gajnon.

La antaŭkongreso en Parizo okazis en la UNESKO-palaco. Tion ebligis la konsultaj rilatoj de U.E.A. kun UNESKO. La antaŭkongreso estis fakte ligita al la Internacia Konferenco de Popoluniversitatoj, kiun prezidis S-ro Pierre Petit, Prezidanto de la Popoluniversitato en Rosny-sous-Bois kaj organizinto de la konferenco. La debatoj de la konferenco okazis en la franca kaj en Esperanto, tiel ke ĉiu partopreninto povis paroli en unu el la du lingvoj, aŭ en kiu ajn alia, sed ĉio estis tradukita al Esperanto. Tiamaniere Esperanto brile servis kiel komuna punta lingvo de la konferenco. Entute, ankaŭ en la pasinta jaro pli ol 10.000 personoj ĉeestis diversajn internaciajn kongresojn kaj konferencojn, kiel ankaŭ naciajn aranĝojn kun eksterlandaj partoprenintoj, kiuj havis Esperanton

kiel la solan komunan lingvon. La rilatoj kun UNESKO denove plifortiĝis. Ankaŭ la laboroj sur la kampo de informado plue evoluis. La Asocio eldonis bultenon de la gazetara servo en Esperanto, alian bultenon en la angla kaj franca lingvoj por la landoj sen aliĝintaj landaj asocioj kaj sen organizita Esperanto movado, specialan bultenon kun UNESKO-novaĵoj. La Kongresa Gazetara Servo, kiel branĉo de la Informa Fakto de U.E.A., donis en Marseille bonegajn rezultojn: 358 informoj aperis en gazetoj kies komuna eldonkvanto estas 44 milionoj.

El la raporto de komitatano Lic. Tibor Sekelj sekvas, ke lia laboro en Hindujo kaj ĝenerale en aziaj landoj komencis doni bonajn fruktojn. En Hindujo fondiĝis kelkaj societoj kaj nun estas organizata Esperanto-Federacio de Sudaziaj Landoj.

La antaŭ nelonge fondita Eldona Fakto publikigis en la pasinta jaro la verkon Angla Antologio, kiu bonege disvendigis. Tiamaniere, post multaj jaroj la esperanta literaturo denove riĉiĝis per tre grava antologio.

La revuo „Belarto”, kiu havas 72 paĝojn, estos aperinta fine de aprilo. Ĝi estas riĉe ilustrita. Antaŭ la apero venis pli ol 700 mendoj, kio klare montras la grandegan interesiĝon de la esperantistoj por tiu nova eldonaĵo.

La Koresponda kaj Magnetofona Servoj, oficialigitaj en la pasinta jaro, kontentige progresis. Estas fondita nova Servo: la Filma, kiun gvidas S-ro Gian Carlo Fighiera.

Grandan atenton dediĉis la Estraro al la financa situacio de la Asocio. Kun vera kontento estas konstatita la fakto, ke la pasinta jaro finiĝis kun deficitio de nur 760,82 guld. La Asocio do sukcesis preskaŭ forigi la deficiton. Tiu ĉi estas la plej sukcesa financa jaro en la lasta tempo kaj tre verŝajne eĉ en la tuta historio de U.E.A. La bona rezulto estas ŝuldata ĉefe al la fakto, ke niaj oficistoj en la Centra Oficejo, tre malmultaj konsiderante la nombron de la membraro kaj la multajn aktivecojn de la Asocio, tre sinofere laboras ankaŭ ekster la oficejhoroj.

La Estraro ekzamenis ankaŭ la programon de la Kongreso en Mainz kaj post kelkaj malgravaj ŝanĝoj aprobis ĝin. Laŭ ĉio ŝajnas, ke la Kongreso en Mainz estos unu el la plej sukcesaj en la historio de U.E.A. Dum la Kongreso estos aparta festo dediĉita al la 50-jara jubileo de la fondiĝo de la Asocio.

Por la Universala Kongreso en la jubilea jaro 1959 venis du invitoj: unu de Varsovio, la alia de Bruselo. La Estraro invitis S-ron Jaumotte, Prezidanton de la Reĝa Belga Ligo, ĉeesti la debaton

pri tiu ĉi punkto de la tagordo. Post tre detala diskuto estis decidite telefone alvoki la oficejon de Asocio de Esperantistoj en Pollando, kiu en la sama tempo havis kunsidon de sia konsilantaro, por peti informojn pri kelkaj gravaj elementoj. Ricevinte pozitivan respondon al ĉiuj starigitaj demandoj, la Estraro unuanime decidis, ke la Universala Kongreso en 1959 okazu en Varsovio, sed samtempe decidis principe, ke la Universala Kongreso en 1960 okazu en Bruselo. La Estraro esprimas la esperon, ke la Kongreso en Varsovio estos impona manifestacio de la forto de la esperantismo kaj ke ankaŭ tiamaniere estos farita omaĝo al la memoro de la genia aŭtoro de Esperanto D-ro L. L. Zamenhof.

Kun aparta atento la Estraro konsideris la progresadon de la preparlaboroj por la grandaj festoj en la jubilea jaro. La Ĝenerala Sekretario informis, ke la formiĝo de la Internacia Organiza Komitato bone progresas kaj ke li povos fine de la monato komuniki al la esperantistaro la nomojn de la membroj. Paralele estas entreprenitaj paŝoj por la organizo de speciala Internacia Patrona Komitato de tre elstaraj kaj internacie konataj personecoj. La Ĝenerala Sekretario esprimis la esperon, ke ĝis la Kongreso en Mainz povos esti formita ankaŭ tiu Komitato. Intertempe komencis alvenadi donacoj por la Fondaĵo-Zamenhof, kies rimedo estis uzataj por diversaj publikaĵoj kaj aliaj aranĝoj en la jubilea jaro. Entute ĝis nun estas kolektita la sumo de 1612,01 gld. La Estraro konstatas, ke tiu sumo estas ankoraŭ treege malgranda kaj firme esperas, ke ĉiu Esperantisto

en la mondo, eĉ kun la plej modestaj rimedoj, kontribuos por tiu Fondaĵo kaj tiamaniere helpos ke la festoj estu kiel eble plej imponaj kaj altnivelaj.

Inter la aliaj prezentitaj punktoj gravan lokon okupis la demando pri la Biblioteko de U.E.A., kiu ankoraŭ troviĝas en Ĝenevo. Estas decidite, ke la Prezidanto nepre tre baldaŭ vizitu la administranton de la Serva Oficejo kaj aranĝu ĉion por definitiva transporto de la Biblioteko al la Centra Oficejo de U.E.A. en Rotterdam, kie jam troviĝas taŭga ejo por tiu celo.

La Estraro decidis doni sian apogon al la interesa plano prezentita de S-ro Hans Bakker pri aranĝo de karuselvojaĝo tra kelkaj eŭropaj landoj. Detaloj estos publikigitaj en la revuo kaj en la jarlibro.

La Estraro kunsidis entute dum 22 horoj. Malgraŭ la diverseco de la opinio pri pluraj eroj, la agordo estis bonega, ĉar ĉiu el la ĉeestantoj celis per siaj proponoj kaj opinioj nur la bonon de la Asocio kaj la pluan progresadon de la Internacia Lingvo. La Estraro alvokas ĉiujn organizaĵojn, ĉiujn ĉefdelegitojn kaj delegitojn, ĉiujn organojn de la Asocio kaj ĉiujn unuopajn membrojn intensigi sian laboron, varbi novaĵajn membrojn al U.E.A., kontribui al la Fondaĵo-Zamenhof, kaj ĉiel helpi, ke U.E.A. eniru la jubilean jaron en 1959 pli forta ol iam antaŭe, pli reprezenta ol iam en sia historio, tiel ke en la jubilea jaro plene montriĝu la granda signifo de la devizo

UNUECO ESTAS FORTO

I.L.

En Mainz apud la bela Rejno

Ĉiuj feliĉaj karakterizoj de la lastjaraj kongresoj, kiujn la sperto montris pozitivaj, unuigis en la Kongreso de Mainz por doni al ĝi novan brilon. Tio ne rilatas nur al teknikaj kaj administraj plibonigoj, sed ĉefe al la esencaj trajtoj de la manifestacio mem.

La utiligo de Esperanto por fakaj laboroj ĉiam estis unu el la celoj de la Universalaj Kongresoj. Sed en Mainz por la unua fojo rekte unu el la kongresaj sekcioj ne diskutos poresperantan temon, sed alfrontos per la Internacia Lingvo gravan kulturen demandon. „Reciproka aprezo de la okcidenta kaj orienta kulturaj valoroj” (tute speciale temas pri la ekstremorienta) — tagordpunkto de la Unua Sekcio — apartenas al la problemoj, pri kiuj plej multe okupis sin la lasta Kongreso en Tokio de la PEN-klubo kaj kiu eniris ankaŭ en la „grandajn projektojn” de UNESKO. La Dua Sekcio per sia debato pri la lokaj grupoj alportos lumon al la malekvilibra stato en nia Movado, kie la lokaj aktivecoj ne tiel kontentige pulsadas kiel la internaciaj. Antaŭ du jaroj komenciĝis granda ekfloro de seriozaj fakaj kunvenoj en niaj Kongresoj. Mainz gastigos la plej grandan nombron da

ili. Ne nur la nombro, sed ankaŭ la kvalito kreskis, ĉar la fakkunvenoj plu ne estas okazaĵo por fermita rondo da esperantistoj, sed havas ĉiam pli grandan signifon por larĝaj tavoloj de la ekstera publiko. La Internacia Somera Universitato prezentas ĉijare la plej konatajn talentojn de nia Movado: Collinson, Yagi, Lapenna, Privat, Waringhien kaj aliaj.

Post trijara paŭzo la Oratora Konkurso denove donas al la junuloj la eblecon elprovi sian lingvokapablon. Post dujara neapero, la Universala Ekspozicio, ne muzeo sed vivanta prezento de la vivanta Esperanto, estos montrata al la publiko kaj al la esperantistoj. Same kiel la Oratora Konkurso, la Literatura Kaso kaj la Infana Kongreseto, la Ekspozicio estas finance subtenata de L.K.K. La plej juna kreaĵo de la Kongresoj, la Infana Kongreseto, donos al niaj plej malgrandaj kongresanoj unu semajnon da feliĉo. Kompense ili donos al ni oran ekzemplon: kiamaniere oni povas plene apliki la lingvon eĉ en la familia vivo. La Kongreso ĝojas, ke en ĝia sino, kvankam kelkajn tagojn antaŭe, reokazas la Seminario de S-ro Cseh, kies celo estas formi novan generacion

da taŭgaj instruistoj. Inter la novaĵoj de la Mainza Kongreso, ĝi okupas certe elstaran lokon.

Per „Fantomoj” (Reaperantoj) de Ibsen la Kongreso revenis al siaj plej puraj klasikaj tradicioj: tradicioj, kiuj jam povas nombri la surscenigon de Shakespeare, Molière, Goethe, Gogol. La geaktoroj de la „Internacia Arta Teatro” apartenas al diversaj landoj kaj Esperanto estas la sola komuna lingvo, ilia kaj de la publiko. La reĝisoro, Srdjan Flego, kiu brile prezentiĝis en Marseille per la monologo de Ĉekov „Pri la malutilo de la tabako”, ludos dum la Kongreso alian Komedion, kiu estos sendube aŭdaca originalaĵo ne nur en la Esperanto-Movado, sed ĝenerale en la arta mondo. Je distanco de jarcentoj, li revivigos la italan „Commedia dell'Arte”, fama en la tuta Eŭropo ĝis la reformo de Goldoni, en kiu la aktoroj ne ludas parkere, sed devas verve improvizi sian rolon antaŭ la publiko en la larĝaj linioj de la verko. En la lando de la muziko ne povis manki muzika programo. Kaj fakte ĝi alportos freŝan paŭzon al la Kongresaj laboroj per Muzika Vespero, kun ĉielarka prezento de muzikoj de ĉiuj landoj kaj de ĉiuj tempoj, de la Opero ĝis la modernaj kanzonoj. Konataj kantistoj ludos en ĝi. Muziko ĉe la Inaŭguro, fare de la Filarmonia Asocio de Mainz. Muziko dum la Jubilea Festo de UEA. Muziko dum la Kongresa Balo. Kiel oni konstatas, la interaktoj de la Kongreso estas multaj kaj variaj: akceptoj, ekskursoj, vizitoj, bankedo, junula vespero. Ĉio, kio okazos en tiu aŭgusta semajno en la renesanca kongreseja Palaco, apud la verdaj akvoj de la plej prikantita rivero en la mondo, longe restos en la memoro de la partoprenantoj. Por plilongigi sian ĝojon, multaj komencas sian kongresan aventuron en Homburgo (Saar) ĉe la oficiala Antaŭkongreso kaj finas ĝin en Bruselo aŭ en Tirolo, celo de la komunaj postkongresaj vojaĝoj. Koscia pri la graveco de la Kongreso, al kiu ampleksa programo kaj amasa partoprenado donas tiom da brilo, la Loka Kongresa Komitato por la unua jaro invitis ne nur UNESKOn kaj ĉ. 80 registarojn sendi reprezentantojn, sed ankaŭ petis ĉirkaŭ mil gravajn internaciajn asociojn, registarojn kaj neregistarajn, konstati per propra sendito la avantaĝojn de Esperanto kiel komuna lingvo por la internaciaj rilatoj.

Dekoj da personoj dum miloj da laborhoroj kunkonstruis dum longaj monatoj la Universalan Kongreson. En ĝi ili kreis la esencon, nome la laborojn de la Kongreso, morala devo de ĉiu esperantisto, kaj la konturojn, nome la distraĵojn. Bona kongresano scias, ke oni iras al kongreso por serioze kongresi: kaj por praktiki Esperanton. La Universala Kongreso ne apartenas al unu lando aŭ al unu popolo, sed al la tuta homaro. En ĝi homoj el la diversaj kontinentoj kunvenos por interŝanĝi ideojn, kompari spertojn, apudmeti tradiciojn kaj kulturojn kaj serĉi en sinforĝeso ne tion, kio

apartigas, sed tion, kio unuigas. En tiu giganta manifestacio Esperanto estos la ĉefa rolanto. La publiko juĝos pri ĝia valoro.

G. C. Fighiera

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

BIBLIOGRAFIO DE LA INTERNACIA LINGVO POR LA JAROJ 1956-1957

La kunlaboranto de CED por la Bibliografio, s-ro Mag. W. Auld, ĵus ellaboris la Kvaran Aldonon al la Bibliografio de la Internacia Lingvo. Tiu ĉi Aldono rilatas al la periodo 1956—1957. Entute ĝi havas 169 erojn, el kiuj 3 apartenas al aŭtobiografio, 1 al biografio, 3 al dramo, 1 al eseo, 13 al fikcio, 1 al historio, 1 al geografio, 7 al kantoj, 8 al legolibroj, 22 al lernolibroj, 3 al lingvistiko, 12 al poezio, 18 al religio, filozofio, etiko kaj psikologio, 3 al sciencoj, 12 al sociologio kaj politiko, 12 al vortaroj kaj la cetero al diversajtoj.

Entute, inter 1945 kaj 1957 estas registritaj 1.072 eroj laŭ jena divido: aŭtobiografio 13, belartoj 14, biografio 18, dramo 15, eseoj 1, Esperanto-Movado 59, fikcio 88, filatelio 3, geografio kaj vojaĝoj 18, gvidlibroj 11, historio 5, humuro 5, kantoj 44, legolibroj 16, lernolibroj 113, lingvistiko 18, poezio 45, religio, filozofio, etiko kaj psikologio 86, sciencoj 27, sociologio kaj politiko 66, stenografio 4, vortaroj 50, dum la cetero apartenas al diversajtoj.

RADIOELSENDOJ EN 1957

Laŭ la statistiko, kiun ellaboris la kunlaboranto de CED por radio, s-ro G. Larglantier el Parizo, la nombro de Esperantaj radioelsendoj en la jaro 1957 estis entute 1.250 kaj ili daŭris kune precize 317 horojn.

En la jaro 1956 estis entute 1.428 elsendoj, sekve la falo en la nombro de elsendoj estas 178 kompare kun 1956. Tamen, tiu cifero ne devas trompi. Pluraj radiostacioj, kiuj estis aŭdeblaj nur loke — Perpignan, Carlet, La Coruna, Caramulo — ĉesigis siajn elsendojn en la pasinta jaro. Sed aliflanke gravaj radiostacioj, aŭdeblaj sur tre vastaj teritorioj, aŭ enkondukis Esperanto-elsendojn aŭ plilongigis siajn programojn. Al tiuj radiostacioj apartenas Sofio, kiu komencis elsendi la 2-an de junio 1952; Rio de Janeiro, kiu enkondukis parte novajn programojn kaj parte plilongigis la malnovajn; Romo, kiu nun elsendas 3-foje en la semajno; Hilversumo, kiu iom plilongigis la elsendojn.

En 1957 elsendis en Esperanto entute 16 stacioj el 12 landoj.

Tutpaĝa kolora reprodukto

de la pentraĵo „Ene kaj ekstere” de Kjarval, estas nur unu el la interesaj novaĵoj en

BELARTO

Prezo: 2,75 gld. (11 steloj) por membroj
3,25 gld. (13 steloj) por nemembroj

Arto en la lernejoj




En aŭgusto 1957, en Hago (Nederlando) okazis kongreso de la INSEA (Internacia Societo por Edukado kaj Arto). Estis unu el tiuj kongresoj, kie multaj nacioj estas reprezentataj, la kostoj de la tradukoj estas treege altaj, kaj pri kiuj ni do levas la ŝultrojn sopirante: „Ĉu ili ankoraŭ ĉiam ne scias, ke la solvo estas simpla?”

Pri tiu problemo mi nun ne skribu. Ke oni ankoraŭ ne vidas la utilon de neŭtrala komuna lingvo ni povas bedaŭri. Sed ke jam ekzistas internaciaj kontaktoj pri la tre gravaj aferoj Edukado kaj Arto estas pozitiva fakto. Pli kaj pli kreskas la kompreno, ke arto devas formi nemalhaveblan elementon en la edukado. Unu el la unuaj pedagogoj, kiuj donis atenton al tio, estis en la 19a jarcento Alfred Richtwark (Germanujo). Nur ĉiutage la strebado al kultura formigo de la junularo fariĝis ĝenerala. Ne plu tio estas la laboro de kelkaj grupoj (i.a. antropozofoj kaj teozofoj), la bezono nun estas ĉie sentata.

Kia estas nun tiu ĉi situacio en Nederlando? La nederlandaj „renovigantoj”, kiuj per progresiva desegnoinstruado deziras konduki la junularon al pli ĝusta kaj pli profunda kompreno de artaĵoj, kaj antaŭ ĉio ankaŭ advokatas la feliĉon de la infano mem, ankoraŭ batalas kontraŭ grandaj obstakloj. Estas precize la samaj malfacilaĵoj, kiel tiuj, kontraŭ kiuj baraktas ni esperantistoj: miskompreno, konservatismo kaj moka pedanteco. Tial estas precipe grave, ke spertoj povas esti interŝanĝataj je internacia nivelo.

UNESCO faras bonan laboron por instigi la artan elementon en la formigo de la junularo ĉie en la mondo. Pri la ekspozicio „Kreanta Junularo” en la Haga Urba Muzeo (organizita okaze de la INSEA-kongreso), estas faritaj kolorlumbildoj por UNESCO.



Tipa ekzemplo de „kliĉa” infandesegnaĵo. La ĵantazio estas forte bremsita kaj nur povas esprimi sin per tre malriĉaj simboloj.

La nombro de lernejoj en Nederlando, en kiuj desegnado estas instruata, enkondukante la kreivan povon de la infano, ankoraŭ estas relative malgranda.

Tamen ekzistas — krom la lernejoj — kelkaj institucioj, en kiuj, sendepende de la lerneja sistemo, oni povas labori kun la infanoj. La pioniro de tiuj junular-artkласoj estis Franz Cizek, kiu en 1927 mortis en Vieno. Laŭ lia ekzemplo laboras en Nederlando junular-grupoj en Amsterdamo, Roterdamo, Hago kaj Zwolle. La bildoj, kiuj ilustras ĉi tiun artikolon, estas pri la t.n. „Infan-artkласo” en Hago. Tiu ĉi memstara grupo organizis okaze de la INSEA-kongreso ankaŭ ekspozicion de farita laboro, kiu montris desegnaĵojn de junaj infanoj (ĝis 13—14 jaraj).

Oni povas scivoleme sin demandi, kiamaniere nun laboras tia grupo, kiel ekzemple la Haga artkласo.

Tiam ekestas kelkaj demandoj, kiuj estas negative respondataj de la kontraŭstarantoj de la koncernaj ideoj. Plej grava estas fakte, kion oni nun devas postuli de la instruisto, kaj ĉu oni ankoraŭ povas nomi lin „instruisto” en la tradicia senco de la vorto. Kulmina punkto nome estas, ke la opinio, ke la instruisto instruu al la infanoj, kiel ili kopiu la naturon, devas esti forŝovata. Oni povas demandi, ĉu, kiam la infanoj estas lasataj pli liberaj, ne eksplodas sovaĝa senorda bando, kiu sur ĉio ŝmiras.

Tiuj, kiuj diras tion, montras ke ili ne havas envidpovon en la animo de la infano. Tiuj, kiuj orientiĝis per infanpsikologio, scias, kiom multe da karakteroj ekzistas. Speciale la psikologia tipologio de C. G. Jung (svisa psikologo) havigis al ni nombron da desegno-pedagogiaj donitaĵoj.

Havante scion pri tiuj teorioj, oni povas akiri pli ĝustan komprenon pri la psikaj enhavo, kiuj formas la bazon de infana esprimo. Ke do ĉiu infano plensmirus la paperon per malpura farbo estas malvera. Ĉiu infano laboras laŭ propra naturo kaj bezono: delikata aŭ maldelikata, plena aŭ malplena, gaja aŭ malgaja. Desegno kun malpuraj malhelaj koloroj preskaŭ ĉiam indikas iun psikan konflikton. (Tiam la instruisto devas kunlabori kun la psikiatro).

Ankaŭ la temo povas rakonti al ni ion pri tio, kio okupas la infanon. Ofte infano desegnas tion, kion ĝi ne povas diri. La propra elekto estas plej grava. Nur se tio estas nepre necesa, temoj aŭ tehnikaj admonoj estas donataj.

Se oni estas konvinkita pri la fakto, ke la infano en bonaj cirkonstancoj harmonie ekdisvolvigos sian kreaĵon povon, oni nur povas aprobi ĉi tiun labormetodon.

La tasko de la instruisto, kiu tie ĉi pli bone povas esti nomata „gvidanto” (ĉar li gvidu la entuziasman iniciativon), estas antaŭ ĉio, ke li zorgu pri bona sfero, stimulu la infanon.

Disvolvante la proprajn kapablecojn de la infanoj, tiu ĉi laboro povas fariĝi pozitiva elemento en la pedagogio. Kiaj bonaj rezultoj krome estas akireblaj, vidigas la bildoj.

Jan Schaap, jr.



Infano kiu neniam desegnis laŭ mortaj modeloj akre observas la naturon. La rezulto estas vigla desegnaĵo, al kiu kontribuas samtempe ĵantazio kaj ekstera mondo.

Novaj Libroj

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.
*) ricevebla ĉe U.E.A.

ANGLA ANTOLOGIO, 1000—1800.*)
Redaktoroj: William Auld kaj Reto Rossetti. Enkonduko de Marjorie Boulton. Eldona Fako de U.E.A. 320 pp. Bindita. Prezo 10 ned. guld. (40 steloj).

Kiel komenci alie ol per la esprimo de granda ĝojo! La tiel ŝatinda serio de diversnaciaj antologioj, jam delonge ne daŭrigata, jen ree pliriĉiĝis, kaj eĉ per volumo impona laŭ ekstero, trezora laŭ enhavo, laŭdinda laŭ lingva prezento. Ekde la pratempoj ĝis la dekoka jarcento inkluzive konkeras por ni ĉi tiu bela libro valorojn el la angla literaturo. La ordinara leganto — homo normala — preninte ĉi tiun trezoron, povas ĝin senembarase ĝui, tie ĉi kaj tie klakante per la lango pro plezuro. La recenzanto ne povas sin transdoni al tia ŝmaca voluptado: lia devo estas serĉi makulojn, erarojn kaj pekojn kaj registri tiujn, kiel skarabkolektisto siajn viktimojn.

La recenzanto havas siajn ŝablonojn. Antologio-renczanto ekz-e kutimas kunmeti pli-malpli longan liston pri la literaturpecoj laŭ lia opinio pli prezentindaj ol la prezentitaj. Kaj ĝenerale li ankaŭ estas prava, sed ĝenerale ankaŭ la redaktoroj ne estas malpravaj. Unu kaj aliaj, nome, havas siajn vidpunktojn pravigeblajn, kaj ĉiujn vidpunktojn oni ne povas kontentige akordigi. Alivorte, ne ekzistas, kaj verŝajne neniam ekzistos perfekta antologio. Precipe ne el literaturo tiel granda, tiel frue evoluinta kaj doninta mondajn ĉefverkojn, kiel la angla.

Feliĉe, la legantoj plejparte ne pretendas tian esoteran perfektecon: ili volas interesan legaĵon, bonan lingvaĵon, pli-malpli detalan orientiĝon pri la literaturo vivo de la respektiva popolo. Kaj mi diru jam anticipu, ke ĉi tiujn postulojn la libro bone plenumas. Kaj per tio oni povus ankaŭ fini ĉi tiun recenzon, aldonante la faman alvokon: *tolle, lege* (prenu, legu).

Sed jen la metio recenzas! Ĝi devigas rimarki kaj kritiki. Kaj jen la juko recenzista: montri aŭ ŝajniĝi kompetent-eon. Ek do!

La volumo komenciĝas per la enkonduko de Marjorie Boulton. Prenante nin je la mano, ŝi trapromenas kun ni la ĝardenon de la angla literaturhistorio, klarigante, orientante, karakterizante. Ĉe pluraj partoj ŝi nur preterpase diras ion kaj post resuma instruo fingromontre listigas la florantajn arbetojn, sed kelkfoje

ŝi haltas por paroli longe kaj elokvente kaj entuziasme; tiam temas pri gigantoj: Chaucer, Shakespeare, Milton, Plaĉa, facila kaj tamen riĉa legaĵo, plezure legebla dum unu sido. Kion en ĝi do riproĉi? Nu, tri punktojn mi kolektis pene. 1. Mi kredas, ke la Angluja latinlingva literaturo apartenus al ĉi tiu libro (ĉar kien aliloken?) kaj tial oni devus memori almenaŭ pri tiaj granduloj kiel Roger Bacon aŭ Thomas Morus. 2. La aŭtorino ŝajne pli ŝatas la poetojn ol la prozistojn: pri tiuj ŝi parolas sufiĉe larĝe, sed la prozverkistoj povus plendi pri ŝia vortavareco, escepte de Samuel Johnson. Efektive Richardson (kun sia senmorta Pamela), Fielding (kun la pli-ol-angela Amelia), Smollett (kreinto de la praulo de ĉiuj maraj ursoj), Defoe (kun la du ĉefverkoj Robinson kaj Moll Flanders), Laurence Sterne (sen kiu Heine apenaŭ estus verkinta siajn Vojaĝbildojn), Oliver Goldsmith (kun sia plej simpatia morala sentimentalismo), R. B. Sheridan (kun la tiel amuza, kolorriĉa kaj sprita Skolo de Skandalo) — ĉiuj ĉi kune ne ricevis tiom da linioj, kiom S. Johnson. Sed S. Johnson estas tikla punkto. Li apartenas al tiuj misteroj, kiajn havas ankaŭ aliaj literaturoj: eksterlandano neniel povas kompreni la senmezuran admiron, per kiu al li omaĝas liaj samlandanoj. Pri liaj paroloj en la *Boswell-a* biografio mi legis ie: „kelkloke mi konjektis, ke ĉi tio plaĉas al mi, se mi estus anglo”. Pardonon, se mi ofendis sanktajn sentojn. 3. Pri Johnson mi ekmemoras, ke oni eble tamen devus diri almenaŭ unu frazeton pri *Macpherson*; falsisto aŭ ne, li faris egan efikon en la tuta tiamanda mondo. Kaj ankoraŭ unu forgesito: la kompatinda *Bunyan*.

Tiel trankviligante mian recenzistan konsciencon, mi povas eldiri, ke la enkonduko estas klara, klera, simpatia, vigla, katenanta la intereson ĝis la fino.

La libro aparte donas la poezion kaj la prozon. La poezia parto estas impone riĉa: oni vidas, ke Esperantangujo nun staras vere unualoke laŭ la nombro da bonaj kaj bonegaj versmajstroj. Rilate la elekton de la materialo, kompreneble, la recenzisto ree profesie rigoras. El Chaucer — li ĉikanas — oni devus doni pli multe kaj nepre oni devus traduki amplekse el la Prologo de la „Tales”. El Shakespeare — kiom estus sufiĉa el li? Neniom. Multe, multe ankoraŭ oni volus havi, ekz-e lirikaĵojn el la komedioj, fragmentojn el la tragedioj, tiel ke ĉiuj

vivperiodoj estu reprezentataj, Kompreneble devus resti ankaŭ la balkosceno el la Romeo kaj la oracio de Antonio — bonege elektitaj. Sed por ĉio ĉi necesus multe pli dika libro — mi diris ja, ke oni ne povas fari perfekta la anglan antologion. El Milton, miaopinie, oni ne devus neglekti la junaĝajn poemojn (L'Allegro, Il Penseroso); sed tion pli facile estas postuli ol traduki. El la Perdita Paradizo eble pli prezentindaj ol la plena dua kanto estus la grandioza alvoko al la Lumo kaj la nesuperebla monologo de Satano el la unua kanto:

What matters where if I be still

the same...

El Pope — nu, la didakta poemo estas certe valora, kaj ĝia brila traduko estas rajte premiata, sed ĉu ne estus amuze legi iun silfaventuron el la Rabo de Buklo? Nekontentigebla — oni diros, kaj tial mi jam apenaŭ kuraĝas plendi, ke Donne estas reprezentita sub sia signifo kaj valoro.

Koncerne la prozan parton mi ne rajtas fari pretendojn, mi ja ne povas listigi, kion mi volus vidi en — ni diru — kvinvoluma antologio. La donitaj pecoj ĝenerale estas allogaj, kaj tio rilatas ankaŭ al la plej malnovaj, ekz-e al la Morto de Arturo, kun ties kelta fabel-eco, mortiga kavalir-idealismo kaj stranga, nedifinebla angla melankolio inundanta el la muzike sonora teksto. Tujsekve la rakonto de *Barnabe Riche* estas noblamaniere elbilita, fabele aventura kaj nervotikle interesa, el la bonega lernejo de la Dekamerono. Ne malpli interese klaĉas *Nashe* en sia „Malbonŝanca Vojaĝanto”. Sed mi ne daŭrigas la vicon de noveloj kaj romanfragmentoj, ĉiuj laŭdortoj baldaŭ eluziĝas plene. Kaj tiajn ankaŭ ne bezonas unu *Fielding* aŭ *Swift* (trafega elekto!), aŭ *Defoe* aŭ *Sterne* aŭ *Goldsmith*. Mi povas nur ripeti: *tolle, lege!*

Ne recenzino, ankoraŭ: mi devas ja paroli pri la tradukoj. Koncerne la poezian parton oni povas resumi la prijuĝon per unu epiteto: *virtuoza*. Vere mirindaj estas la aŭdaco kaj lerto de ĉi tiu tradukista gvardio: ĉiun taskon ĝi kuraĝas ataki kaj ĉiun taskon ĝi kapablas solvi.

Tamen, mi devas ne prisilenti, ke la virtuozecon en la verstraduko ne ĉiam estas samsignifa kun la perfekteco. Ekzistas tradukoj en ĉi tiu libro, ĉe kiuj oni sincere admiras la grandan lerton, per kiuj oni povis kundensigi la anglajn unusilabojn en la plursilabojn de la Esperanta verso, ne pliiĝante la silabnombrojn, aplikante la originalan ritmon kaj rim-aranĝon. Tio estas majstraĵo kaj bravaĵo, sed kelkloke inter la brilo de la formlerto ŝajnas perdiĝi la ario de la poemo.

Jen ree la malnova demando, ĉu oni devas la anglajn poemojn nepre traduki en la originala versformo. Laŭ mia opinio, ne. Ĉar bonvolu konsideri la jenon: la angla lingvo ne konas la aleksandran verson, kaj la francajn aleksandrojn oni tradukas per kvinjamboj; el tio stavec sekvas, ke la anglajn kvinjambojn oni devas traduki francen per aleksandroj,

kaj vere tion faras la francoj. Ĉu pri Esperanto ne validus la samo? Kompren- eble, mi ne volus tion dekreti kiel abso- lutan leĝon, sed ekzemple al la larĝaj odoj de Keats pli konvenus kaj ankaŭ laŭefekte pli konformus la Esperanta aleksandro, ĉar la rapidkura Esperanta kvinjambo estas tro mallonga kaj iom malplena apud la pezpaŝa kaj riĉenhava kvinjambo angla. W. Auld foje akre kontestis la konkludon de Waringhien, laŭ kiu ĉe tradukoj en Esperanton el la multe pli densa angla lingvo, kiel la kompara silabstatistiko montras, oni de- vas pliigi la silabnombron. „Oni ne mik- su la poezion kun la statistiko” — tiel (proksimume) protestis W. Auld. Ta- men, nun li devis kapitulaci antaŭ la venĝema statistiko almenaŭ en unu poe- mo, en la fama Tigro de Blake. Ne helpis plej sagacaj densigmetodoj, nek la „sensilabigo” de „i” en „piedo”, „kia”, „kiaj”, „kiam”: en du lokoj estis ne- eviteble preni unu silabon pli.

Ni rigardu nun laŭvice la poetojn- tradukintojn. El ili certe W. Auld pre- nis sur sin la plej grandan kaj malfacil- an taskon: tradukon de 41 poemoj, parte ampleksaj, parte tre pretendemaj laŭ formo. La lumpunktoj de lia traduklaboro estas: el *Chaucer* la vulgara amfilozof- ado de la virino el Bado; el *Thomas Wyatt* kanteto kun lude solvitaj mal- facilegajoj (Ĉu tiel min forlasi?); el *Spenser* la sonetoj 67 kaj 76 (domaĝe, ke mi ne povas citi ilin plene); el *Sidney* la soneto 31; el *Pope* la Eseo pri Kriti- kado kun multaj plaĉaj, facile tradukitaj sentencoj, kiel ekz-e:

*Iome kleri estas tre danĝere,
Eltrinku aŭ ne trinku Muz-rivere:
La cerbon ebrüigas trinko eta,
Sed ree nin sobrigas sorb' kompleta.*

Poste li brilas — krom la sprita traduko de kelkaj korteganaj poemoj, facilaj ne- niaj flirtaj kiel libeloj — en la 89-a soneto de *Shakespeare*, en la „Preposto de *Bray*”, anonima satiro kun morda sarkasmo pri „mantelturnado” prezentita tiel freŝe, kvazaŭ ĝi estus originalo. Kaj el la cetera multo ni prenu fine la Ele- gion de *Thomas Gray*, kiu tuj ekde la unuaj versoj:

*Tagmorton signas sonorila tristo,
de l' kampoj, muĝaj brutoj lante pasas,
trenpaŝas lace hejmen la plugisto,
kaj al mi kaj al nokt' la mondon lasas...
ĝis la strofo inspira al Baudelaire:*

*Sennombrajn gemojn de plej pura brilo
kavernoj ombraj de la mar' koncipas,
sennombraj floroj ruĝas sen admiro
kaj sian dolĉon en dezert' disipas...*

kaj ĝis la fina Epitafio sorĉkatenas la leganton. Ĉi tie vere sukcesis la poeto- tradukinto fari la miraklon: senperforte densigi la versojn tiel, ke senperde ili esprimu la originalon. La denson de la teksto oni sentas ĉi tie ne kiel kun- premitecon, sed kiel maturecon de la lingvaĵo.

La granda tasko de *J. Francis* estis traduki kanton el la Perdita Paradizo de *Milton*. Kvankam ne egalnivela en ĉiuj partoj, la traduko havas multajn tre sukcesajn lokojn, en kiuj traardas la trohejtita baroka heroismo de la poeto „fiera kiel la diablo”. Kaj *Francis* povas adaptiĝi ankaŭ al la facila Muzo de *Herrick* kaj similaj (Poezio de vestoj, ekz-e), sed la kulmino de lia tradukarto estas „Al sia pudora amatino” de *Mar- vell*. Mi ne povas ne citi:

*... Ekde l' diluv' mi amus vin,
kaj vi rifuzis kun obstin'
ĝis konvertiĝ' de l' Judoj. Pli
ŝveladus mia amembri'
ol imperioj, sed pli lante.
Cent jarojn mi, vin rigardante
himnadus la okulojn; du
cent daŭrus mia sankta ĝu'
pri ĉiu mam'; kaj por jubil'
pri l' rest' necesus tridek mil.
Epokon ĉiu part' kaperus;
ĉe l' lasta, via kor' aperus...*

R. Rossetti prezentas al ni la nomitajn scenojn el *Shakespeare*-tragedioj en tra- duko kristalklara, ne nur pluzure legebla, sed ankaŭ facilsona, bonege komprenebla aŭskulte, do vere teatrotauĝa. Mi devas rezisti la tenton de abunda citado. La ceteraj kontribuajoj de *R.R.* ne estas multaj (bedaŭrinde); certe la Skota Anto- logio kaŝas de li multajn trezorojn, inter ili la eminentajn *Burns*-interpretojn (mi esperas, ke ne mankas la poemoj pri *John Anderson* kaj *Findlay*). Por montri lian arton, jen kelkaj versoj kriantaj de antaŭ tri centjaroj kaj duono la eternan indignon de moralisto (*N. Breton*):

*— Kanajlo jen laŭ nasko kaj eduko,
Sen ero eĉ da virto en l' animo,
Malsobra sklavo kun orgojla nuko,
Pensanta nur pri peko kaj pri krimo,
Nestanta en la honto kaj la ŝlimo:
Se li per ora plado eksonoros,
Kiel honesta hom' li tuj valoros...*

J. S. Dinwoodie, same, rezervis siajn fortojn por la Skota Antologio: ĉi tie li donas nur 7 poemtradukojn. Kvankam li inklinas precipe al la moralumaj poetoj (*Herbert*, *Shirley*), la tentulo *Herrick* povis delogi ankaŭ lin por la interpreto de ĉarme milda ampoemeto. Lia ĉefa majstraĵo en ĉi tiu volumo estas „*Jeru- salem*” de *Blake*:

*... Portu al mi paŝarkon mian
Orflaman, sagojn de deziro
Kaj lancon! Nuboj, disvolviĝu!
Alportu ĉaron de sopiro!*

*Ne ĉesos mia lukto mensa,
Nek glav' en mia man' enuos,
Ĝis en la verda land' Angluja
Ni Jerusalem ŝinkonstruos.*

A. D. Foote aŭdacis ataki kaj estis sufiĉe forta por fini *Protalamion* de *Spenser*. Ne ĉi tio, tamen, estas lia pleja sukceso, malgraŭ mia respekta kapklino antaŭ lia fortostreĉo. Nek eĉ la kroma

dekduo da rimaj tradukoj, kvankam en la „Kanto” de *Donne* li montras ekstran lerton:

*... Kvankam ŝi fidelos vere,
Ĝis vi informos min letere,
Malgraŭ vi, jen,
Jam falos ŝi en
La pekon, dum mi kuros tien.*

La pinto de lia kontribuo estas la alit- eracia traduko de la poemo „*Sir Gaveno*” per kiu li superas eĉ la *Auld*-an traduk- on de „*La Marvagingo*”. Ŝajne li havas specialan kapablon por tiu versospeco. Sed mi atentigas lin pri la rimarkigo de *Baldur Ragnarsson*: la bona aliteracio estas ne la sameco de la vortkomencaj konsonantoj, sed la sameco de la kon- sonantoj komencantaj akcentan silabon (ekz-e: granda ĉagreno). Ion ankoraŭ: ĉu la kompatinda leganto neniam ekscios kio estos al *Sir Gaveno* ekiranta kontraŭ la terura Verda Kavaliro? Oni devus iel orienti pri tio, eble en la redakcia poŝto de ĉi tiu revuo.

G. Waringhien, la sola „kontinentano” en ĉi tiu poezia roto, donis la 99, *Sone- ton* de *Shakespeare* (mi miras, ke li, granda amanto de fiksfarmaj poemoj, elektis ĝuste tiun herezan — 15-versan — soneton), kaj krome 4 galantajn juvel- etojn, kiuj, facetitaj de li arte kaj dok- te, dispersas petolan lumludon.

Pri la tradukintoj de la proza parto, premate de manko de loko aŭ eble sub la influo de *Marjorie Boulton*, mi ne parolos tiel detale, kvankam mi vere dezirus skribi iliajn nomojn unu sub la alian en ora kadro, kvazaŭ ĉizante ilin sur honortabulon. Efektive, mirinde ega- la nivelo kaj egale alta nivelo de lingvo! Dum oni legas la grandiozan *Swift*, oni emus doni la palmon nepre al *W. Auld*, sed jen kiel vivavoĉe anekdotas *O. Gold- smith* per la familiara lingvaĵo de *F. R. Banham*, kiel nin kaptas la mezepoka atmosfero dank' al la reprodukta arto de *C. D. A. Capp* en la peco el *Thomas Malory*, aŭ la peza majesto de la ĉio- spita konvinkiĝo de *Milton* en la pura kaj puritana prezentado de *J. S. Din- woodie*. Kaj tiel mi povas daŭrigi la laŭdliston tra *G. C. Jervis*, kiu tiel bonguste rerakontas la „*Aventurojn* de *Si- lingo*” de *Addison*, *E. P. Ockey*, kies lingva lerto faras por ni tiel amuza tiun mikson el farso kaj teruro en la „*Bon- ŝanca flikisto*” de *Th. Dekker*, ĝis *A. Venture*, dank' al kies fleksiĝema lingv- ajo tiel bone sentiĝas — inter aliaj — la la kaprica (*whimsical*) stilo de *L. Ster- ne*. Tia nombro da lingvospertaj kaj artolertaj tradukantoj montras vere altan nivelon de la angla esperantistaro, kaj pri tio vere povas fieri la Insulo, iom simile al la deca fiero, kiun *Marjorie Boulton* esprimas ĉe la fino de sia en- konduko.

Tamen, ĉar la recenzisto estas ne nur anĝelo kun palmobranĉo, sed ankaŭ „*diabolus circuli*”, mi devas surpingligi kelkajn korektindaĵojn lingvajn, kiuj estas preskaŭ tiel komunaj ĉe ĉiuj tradukintoj kiel la bonaj kvalitoj, do ŝajnas speciale

anglaj. Ilia kolekto do iel apartenas al la Angla Antologio.

1. Kelkloke montriĝas simptomoj de *tiom-malsano*, urĝe bezonanta kuracon laŭ *de Hoog*. Male, anstataŭ *tiel pli granda* (pĝ. 228, linio 18) necesus *tiom pli granda*. 2. *Preter* en Esperanto havas la solan sencon „al kaj tra kaj trans apud...”; uzi ĝin ankaŭ en la sencoj „krom”, „super”, „trans” estas anglismo (propre latinismo). 3. Oni iel speciale ŝatas kaj troŝatas tie ĉi la vorteton *ajn* (post *neniu* ĝi ĉiam estas superflua). 4. Post la subjunkcia *kvazaŭ* oni uzas jen as-modon, jen us-modon; la lasta estas preferinda (tiu malcerteco, cetere, estas zamenhofa). 5. Simila malcerteco (jam ne zamenhofa) montriĝas kelkloke pri la verbotempo en la subpropozicioj; ekz-e: *li vidis ermiton kiu baraktas*. La regulo estas simpla: la tempon de la ĉefpropozicio signas la kiu-subpropozicio per tiu sama tempo, la ke-subpropozicio per la nuntempo de sia verbo. Do: *li vidis ermiton, kiu baraktis*, sed *li vidis, ke la ermito baraktas*. 6. Ĉe substantivaj epitetoj, se ili estas ekvivalentoj, pli konsilinde estas akordigi la kazojn: *rigardu ĉi tiun grandan urbon: urbon* (ne: urbo) *de rifuĝo*. 7. Anstataŭ *kutimis al io*, pli ĝustus *kutimiĝis al io* aŭ *ekkutimis ion*. 8. Kial skribi *ek de*, dum oni skribas *disde*?

Ni ne forgesu pri la tiel nomitaj „neologismoj” (al multaj el ili jam kreskis barbo kaj eĉ griziĝas). Nu, tiaj troviĝas preskaŭ nur en la poezia parto, kaj — krom kvin — estis uzataj kaj registritaj jam antaŭ dudek kvin jaroj. Kaj tiuj kvin, kaj aliaj sesdek, eble ne tute familiaraj ankoraŭ, estas klarigitaj librofine. Ĉi tio montras, ke la novaj vortoj tamen ne plimultiĝas tiel danĝere, kiel al kelkaj ŝajnigas ilia respektinda timo pri la lingvo, kaj Clelia Conterno Guglielminetti, kiu riproĉe plendis (Nica Revuo N-o 7, pĝ. 35), ke, legonte libron de „kutima angla verkisto en Esperanto”, ŝi devas preni sian Little Oxford Dictionary, ĉi-foje povas malhavi tiun helpilon.

Ŝajne tro longe mi okupiĝis pri ĉi tiu bela, flava kaj agrable dika volumo, sed — laŭ mia opinio — ĝian signifon oni ne povas trotaksi. Ivo Lapenna, kiu en la februara numero gratulis kaj dankis la redaktorojn kaj kunlaborintojn, estas prava en tio, ke la Angla Antologio estas granda paŝo, kaj li estu prava en tio, ke ĝi estas la unua granda paŝo, post kiu la Eldona Fako de la UEA faros paŝojn multajn, ne malpli grandajn. Atendas ja la dua volumo, atendas la Skota Antologio. Kaj atendas multaj diversnaciaj antologioj plu nenie aĉeteblaj. Ĉu ne estus bela tasko por la Eldona Fako, eble kunlabore kun la Asocio de Esp-aj Verkistoj, tiujn elfosi, senpolvigi, poluri, pliriĉigi kaj eldoni? Kaj krome, se citi ree el Thomas Gray:

*sennombraj floroj ruĝas sen admiro
kaj sian dolĉon en dezert' disipas...*
jes, kiom da manuskriptoj entombigitaj en tirkestoj! Kia brila perspektivo estus

la apero de ĉio ĉi, kia altiĝo de nia kulturenivelo, kia plezuro de legemuloj! Kaj la garantio de ĉio ĉi estas sola: aĉeti, aĉeti, aĉetigi!!! Ni devas atingi, ke niaj reprezentaj libroj aperu ne en mizeraj 1000—2000 ekzempleroj, sed 10.000-ope kaj eĉ pliope. De vi dependas tio. Sieĝu la eldonantojn, bombardu ilin per raketoj de libromendiloj, triumfigu nian literaturon. Kaj tion ĉi oni komencu tuj, per tiu ĉi verko, kiu estas inda iniciati ĉi tiun grandan militiron.

K. Kalocsay.

(W. Auld skribas: Por tuj kontentigi D-ron Kalocsay kaj aliajn legintojn de la bonega Sir Gaveno: La temĝadeno estas iom komplika, sed jen la ĉefajo: la lordo, en kies kastelo Gaveno estis restinta, havis edzinon, kiu trifoje provis delogi la kavaliron. Trifoje li ĉaste rifuzis ŝin. Kiam Gaveno fine renkontas la Verdán Kavaliron, tiu trifoje ŝajnigas fortranĉi la kapon al Gaveno, sed tior ne faras. Montriĝas, ke la lordo estis mem la Verda Kavaliro, kaj la tri ŝajniĝoj repagas la trifojan ĉastecon de Gaveno. La tuta afero estis komploto por hontigi la kortegon de Arturo: se Gaveno estus cedinta al la lordedzino, li estus mortinta. Moralo: estu ĉastaj!

Tio ĉi ne estas la ĝusta loko daŭrigi la argumenton pri tradukado el la angla poezio. Sed eble mi rajtas diri, ke D-ro Kalocsay eraras, dirante, ke mi „devis kapitulaci antaŭ la venĝema statistiko” en „La tigo”. En la originalo Blake uzas tute indiferente ĉu kvartroheon ĉu kvarjambon — tio estas normala angla permesaĵo en tiaj poemoj. Mi tute simple permesis al mi la saman rajton, nur mi ne zorgis uzi unu aŭ alian verson sur la sama loko kiel Blake. Laŭ miaj kriterioj, do, la traduko estas „formfidele”: kaj se en du lokoj ŝajnas, ke mi plilongigis la verson, tamen almenaŭ unu verso — la kvara — estas samkriterie malpli longa ol la originalo. Tion nur por la historio.)

KATALOGO PRI LA KOLEKTO DE INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN WIEN. Parto I: SISTEMA KATALOGO PRI LA ESPERANTO-PRESAĴOJ LAŬ LA INTERNACIA DEKUMA KLASIFIKO. Verkita de Hugo Steiner. Eldonis Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, Wien I, Hofburg, Aŭstrujo, 1957. 68 + 399 paĝoj. Prezo por membroj de IEMW 30 rpk, por ne-membroj 35 rpk.

En senpompa vestaĵo, modeste multobligita de Österreichische Nationalbibliothek Wien, aperis dokumento, kiu pro sia graveco meritas vekti vastan atenton, eĉ sensation, en la tuta Esperantomovado. Jen, en la ĉefurbo de Aŭstrio, akumuliĝis per la diligenteco kaj insistado de Hugo Steiner kaj per la daŭre kreskantaj apogo kaj komprenemo de la esperantista publiko, unika trezoraĵo de la esperanta kulturvivo, vera centra bi-

blioteko de la esperanta literaturo. Kaj nun per la publikigo de tiu ĉi katalogo racie aranĝita laŭ la internacia norma klasifistemo, la enhavo de tiu ĉi biblioteko estas en ĉiuj siaj detaloj konigata al la mondo.

La unua motivo de ĝojo kaj dankemo pro la aperigo de tiu ĉi biblioteka katalogo ne estas ĝia perfekteco, ĉar ankoraŭ restas en ĝi multo, kion oni povus perfektigi kaj korekti, kaj pro la abundeco de la materialo tio ne povas mirigi. La motivo de nia kontenteco antaŭ ĉio estas, ke jen ni posedas la unuan racie ordigitan bazon por registrado de nia literaturo, jen kreiĝis la delonge esperata plukonstruo de tiu pionira laboro, kiun antaŭ la unua mondmilito komencis generalo Sebert en Oficiala Gazeto. La dua motivo por bonvensalutado estas, ke en ĝi ni trovas la unuan pli ampleksan suplementon al la dokumentoplena Bibliografio de Internacia Lingvo de Petro Stojan, aperinta en 1929. Pasis 30 jaroj, kaj manko de ĝisdata bibliografio de nia literaturo intertempe fariĝis preskaŭ netolerebla.

La amplekso de la bibliografio de Steiner estas en si mem impona. Estas malfacile rekte kompari ĝian amplekson kun tiu de la bibliografio de Stojan, ĉar la principoj de registrado ne estas tute la samaj. Sed mi povas doni proksimumajn nombrojn. En la bibliografio de Stojan la „Dua Parto: Esperanto” (p. 209-468) enhavas ĉ. 4000 unuojn numeritajn plus multajn kajeretojn, faldfoliojn k.s. nenumeritajn. La bibliografio de Steiner, aliflanke, enhavas entute ĉ. 8000 unuojn, sed inkluzive de multaj kajeretoj kaj de kelkaj ripetajoj, nome en nombro da kazoj, en kiuj oni povas registri publikigajn laŭteme en pli ol unu loko. Tiaj ripetajoj, kiuj en la katalogo povus esti faritaj pli konsekvence, neniel estas riĉindaj, ĉar ili faciligas la trovon de literaturo sub la diversaj temrubrikoj, kiuj tiel fariĝas kiel eble plej kompletaj.

La tasko de katalogisto estas malfacila: la ebloj por laŭtema aranĝo de la unuoj simple estas senfinaj. Ĉiu katalogisto povus fari sian propran sistemon, kiu laŭ lia juĝkapablo kaj laŭ la fako konsiderata povus ŝajni al li plej racia. Tiamaniere ĉiu katalogo povus ricevi sian apartan klasifistemon, kiu ne permesus komparojn de katalogo al katalogo, kaj kiu postulus ĉiujfoje novan manieron de serĉado de indikoj pri unu sama temo. Kontraste al tiu senfina diverseco en la principoj de registrado, la internacie normigita klasifistemo UIDK (Universala Decimale Klasifiko) permesas ĉiam serĉi indikon pri unu temo en la sama loko de la sistemo — kie ajn oni uzas katalogon aŭ bibliotekon aranĝitan laŭ UIDK oni trovas Esperanton sub 408.92, stenografion sub 653, rumanan belliteraturon sub 859 kaj teologion komparan sub 291. Tiel ĉiuj katalogoj ordigitaj laŭ tiu sistemo rekte kompletigas unu alian. Ni ne povas sufiĉe alte taksi la valoron, kiun reprezentas la realigo de tiu klasifprincipo en la katalogo de la Internacia Esperanto-Muzeo. Ni ŝuldas

tion al la instigo de D-ro Eugen Wüster, kiu eĉ disponigis por la klasifado la fakulon Diploming. Wilhelm Reinke, je siaj propraj kostoj!

Kiel supre citite tiu ĉi unua volumo ampleksas la Esperanto-literaturon. Eldonotaj kiel dua volumo estas katalogo de diversaj „helplingvaj sistemoj, provoj, eksperimentoj ktp.“, ankaŭ aranĝata laŭ UIDK, kaj kiel tria volumo, alfabetata katalogo laŭ la aŭtoroj kaj libronomoj indikitaj en la unuaj du volumoj.

Foliumante en tiu ĉi ampleksa volumo de la bibliografio de Steiner mi miras pri la abundeco de la Esperanto-literaturo ankoraŭ nekonata al esperantisto tra pli ol tri jardekoj, eĉ se li estas fervora libroamanto kaj kolektanto. Per tiu ĉi katalogo li ekhavas novan ŝlosilon al la vasta kulturtrezorejo de la Lingvo Internacia.

La eldonombro de la katalogo estas tre limigita. Mi tial konsilas, ke rapidiĝu bibliotekoj, organizaĵoj kaj seriozaj esperantistoj, kiuj ne volas malfruigi provante havigi al si ekzempleron de tiu ĉi unika dokumento.

ALDONA NOTO: En la lastaj jaroj aperis pluraj valoraj special-bibliografioj, kiuj sur diversaj kampoj de nia literaturo grave kontribuas al ĝia registrado. En *Danujo* aperis en 1956 modele redaktita katalogo pri la sekcio de Esperanto en la Komuna Biblioteko de la urbo Aarhus, sub la titolo „*Esperantosamlingen*“ (45 pĝ., eldonita komisie de Dansk Bibliografisk Kontor). Mi ĉi tie memorigas ankaŭ pri la tre utila Bibliografio de dana literaturo tradukita en Esperanto, sub redakto de Poul Thorsen (16 pĝ.), aperinta jam en 1952, ekzemplo sekvinda profite al la kono de la esperantigita beletro en aliaj landoj. En *Jugoslavio* aperis en 1954 sub redakto de Marinko Gjiĵoje la kroate verkita Bibliografio de Internacia Lingvo en Jugoslavio (40 pĝ.), eldonita de Jugoslavia Federacio Esperantista, en *Svedujo* aperis en 1956 katalogo de la biblioteko de la tiam jubileanta Klubo Esperantista de Malmö (37 pĝ.), kaj fine aperis en la sama jaro en *Japanujo* ne malpli ol tri gravaj specialbibliografioj, nome Bibliografio de Japana Literaturo tradukita en Esperanto (21 pĝ.), Bibliografio de Medicina Literaturo Esperanta en Japanujo (46 pĝ.) kaj Bibliografio de Scienca Literaturo Esperanta en Japanujo (30 pĝ.), tri imponaj kontribuaj, publikigitaj (verŝajne de Japana Esperanto-Instituto) okaze de la 50-jara Jubileo de la Japana Esperanto-Movado.

Kiom ajn gravega kaj multe atentata la bibliografia registrado estas por la nacilingvaj literaturoj, ĝi estas eĉ ankoraŭ pli grava por la literaturo de Esperanto. Ĉiu lando kolektas sian literaturon en centraj bibliotekoj surbaze de deviga liverado de ĉiuj publikigaĵoj, kaj krome ĉiu lando pli malpli konsekvence registras sian literaturon kaj tiel konservas por postaj tempoj la tutan trezoron facile alireblan. Por nia Lingvo Internacia, kiu estas uzata plej diversmaniere en c. 100 landoj en formo de gazetoj vari-

enhavaj, libroj, gvidiloj k.a. sur multaj laborkampoj de kulturaj organizaĵoj, de sennombraj sciencaj kaj teknikaj fakoj, de beletro, de turismo ktp., la kolektado kaj registrado estas multe pli malfacila, sed vere ankaŭ multe pli grava, ĉar se ĝi ne estas realigata, neeviteble grandaj valoroj baldaŭ perdiĝos en la forgesiĝo. Antaŭ ol estas tro malfrue ni tial nun devas nepre ellabori *specialbibliografiojn laŭfakajn kaj laŭlandajn*, kaj tiu registrado devas esti farata laŭ *unueca klasifika sistemo*, nome kiel supre klarigite laŭ la Universala Decimala Klasifiko. Granda avantaĝo krome estus, se la publikigo de tiaj bibliografioj povus okazi ankaŭ laŭ *unueca eldonplano*. Mi tial proponas, ke ĝi okazu sub aŭspicioj de la Akademio de Esperanto, Sekcio Bibliografio. Mi petas, ke ĉiuj interesuloj bonvolu sin turni al mi por ke oni en ĉiu aparta kazo povu esplori la eblojn por ellaborado kaj publikigado de dezirindaj bibliografioj konforme al unueca plano.

Paul Neergaard,
Direktoro de Sekcio Bibliografio,
Akademio de Esperanto.

1) *MIA FRATETO*. 2) *DOMOJ*. 3) *LANJO MONTRAS LA VOJON*. 4) *PENJO KAJ SIAJ AMIKOJ*. *Kvar libroj por infanoj*. Eld. Esperanto Press, Oakville, Ont., Kanado. Po. 24 p. en formato 20 x 17 cm. Fortike binditaj. Prezo: preta esperanta eldono po 0,85 kan. dol. (12 steloj); bindita, sed kun tranĉita sed ankoraŭ ne enluigita esperanta teksto po 0,50 kan. dol. (7 steloj).*

Mi tute ne intencis mem recenzi ĉi tiujn verkojn. Sed kiam mi elpakis ilin, ĉeestis mia 3-jara filino, kiu petis rigardi ilin; mi transdonis al ŝi unu — hazarde, *Lanjo montras la vojon* — kaj dum duonhoron ŝi sidis, atente „tralegante“ ĝin, rakontante al mi, kaj de tempo al tempo ankaŭ al mi, la historion laŭ la enhavo. Dufoje ŝi jam diris al mi: „Mi tre amas tiun ĉi libron“. Oni facile komprenos, ke mi ne plu havis emon senigi ŝin je la trovita trezoro, kaj devis decidiĝi al la recenzado. Tamen mi opinias, ke ŝia „amo“ estas la plej bona rekomendo por libroj, kiuj ŝajnas ankaŭ al mi, plenaĝulo, bonege celtrafaj kaj plenigantaj senteblian breĉon en nia armarilo.

Sro Eichholz de la Esperanto-Press havis la trafan ideon adaptigi angla-lingvajn infanlibrojn per engluo de esperantaj tekstoj (kun permeso, kompreneble, de la originala eldoninto). Tiamaniere li solvas la problemon de la malgranda (dusence!) publiko kaj de la kostoj. Li mem skribas: *Ni ne kalkulas pri... profito per tiuj ĉi libroj, ĉar ni scias, ke ĝis nun nur malmultaj gepatroj edukas siajn infanojn ankaŭ esperantlingve. Sed se ni ricevos iom post iom ankaŭ infanliteraturon en Esperanto, tiam espereble pli da gepatroj herede transdonos nian lingvon, kaj al tio nia nova libroserio volas esti instigo*. Li estas gratulinda kaj subteninda pro tio, kaj ankaŭ pro la vere alta kvalito de la

libroj mem. La bildoj estas klaraj kaj allogaj, la teksto estas interesa, kaj la fortika bindaĵo certigas al la libroj longan vivon.

La unua celas precipe infanojn inter 2 kaj 5-jarajn; la dua inter 5 kaj 9-jarajn; la tria inter 6 kaj 10-jarajn; kaj la kvara inter 4 kaj 8-jarajn. Sed kiel atestas mia filino, tiuj aĝoj ne estas rigoraj. Mi plej firme rekomendas la librojn al ĉiuj gepatroj, geonkloj kaj aliaj, kaj mi esperas, ke Esperanto-Press povos daŭrigi tiun ĉi gravegan laboron.

W. Auld

*JAPANAJ FABELOJ.** Tradukitaj de Joŝiŝi Ŝimomura (1904–1953) kaj Kotohiko Macubara; dua eldono, reviziita de Teruo Mikami, eldonita de AMO-Akademio, havebla ĉe AMO-Akademio, Tenmori, Kōzōji, Aiĉiken, Japanujo, aŭ ĉe „*Japana Esperanto-Instituto*“, Hongo-Motomati, Tokio, Japanujo. Broŝurita, 60 paĝoj, 19 x 13 cm; prezo 130 jenoj, aŭ 0,40 Usona dolaro plus 10% por sendkosto (6 steloj).

Tiu libro „estas la unua el la serio de l' Fabelaro Por Tutmonda Infanoj, kiun intencas kolekti kaj eldoni AMO-Akademio en la estonteco“. Ĝi entenas kvin tradiciajn fabelojn el la malproksima Japanujo. Agrabligas la libron kvin kolorbildoj iom eksmodaj sed ankaŭ tradiciaj kaj karakterizaj. La papero estas tre blanka, la literoj klaraj kaj sufiĉe grandaj, kio estas ŝatinda kvalito ĉe porinfana eldonaĵo. Bedaŭrinde la preseraroj estas oftaj, kaj kvankam ili estas kolektitaj sur aldonita folio, ili certe estas maloportunaj por junaj legantoj. Unu tamen ne estas menciita: p. 48 l. 8 de malsupre: „al li kiel ili“, kie devus esti: „al ili kiel li“. La lingvo estas ĝenerale bona kaj klara. Ni notis jenajn erarojn. (A) gramatiko: sur paĝo 15 troviĝas akuzativo post jen: „jen vian pagon“ kaj du senakuzativigitaj epitetoj: „patron kuranta“ kaj „krabidon ploranta“; p. 17 „diris unua“ (unue); p. 18 „estas longe ke...“ (jam de longe...); p. 47 „lian unu piedon“ (unu lian piedon). (B) Vortaro: p. 7 „rulkanto“ ĉu ne pli ĝuste „lulkanto“; p. 9 „idiomojn (anst. idiotismojn)“; p. 22 „ŝi klačis“ (preferinde: ĝi kriaĉis); p. 25, p. 45 „forvidis“ kaj „forvidadis“ (preferinde: vidi lin foriri); p. 29: „plugilas“ (plugas); p. 30 „lasu min ripozigi“ (ripozi sufiĉas); p. 46: „puŝis senmovigi la pordon de interne“ (pli klare: puŝi por senmovigi); aliparte p. 34 kaj aliloke: „oh“ (preferinde: ho).

Iam ni plendis pri la malriĉeco de nia porinfana literaturo en la internacia lingvo (vd. Esperanto no. 612 p. 168).

Ni do salutas kun ĝojo la aperigon de „*Japanaj Fabeloj*“, kaj ni faras tion des pli volonte, ke la rakontoj certe tre plaĉos eĉ al eŭropaj infanoj. La libro meritas sukceson, kaj same la projekto daŭrigi la serion. Ni esperas, ke la tutmonda esperantistaro respondos al la alvoko de la AMO-Akademio, helpante al la realigo de la projekto.

R. kaj J. Gonin,



LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V.” sendu al:
Nicola Minnaja,
Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

URBO HOMBURG-SAAR

Giaj historiaj rilatoj al la internacia mondo

Urbo Homburg, la loko de la 14-a Internacia Junular-Kunveno de TEJO, festas en tiu ĉi jaro la 400-jaran jubileon de sia urbiĝo. En junio de jaro 1558 je petoj de la mastro de Homburg, grafo Johano 4-a de Nassau Saarbrücken, imperiestro Ferdinando 1-a, frato de la famkonata imperiestro Karlo 5-a, donis la urbajn rajtojn al la tiama foirvilaĝo Homburg. Grafo Johano 4-a, la vera fondinto de la urbo, estis dum longa tempo fidela vasalo de imperiestro Karlo 5-a kaj pasigis longan tempon de sia vivo en Bruselo. Li alikonstruigis kiel sian plej ŝatatan oficialan loĝejon la fortkastelon jam fonditan ĉirkaŭ jaro 1000. Kiel „mondumano” li revenis en sian gravan graflandon Nassau-Saarbrücken. La familio de la grafo estis ligita per parencaj rilatoj al la famkonata gento de Oranio, kiu ludis gravan rolon en la liberigaj militoj de la Nederlandanoj. La urbiĝo de Homburg en jaro 1558 okazis en tumulto tempo: Elizabeto, filino de Henriko 8-a, fariĝis reĝino de Anglujo; Karlo 5-a, retiriĝinta jam en jaro 1556 en hispanan monaĥejon, mortis. En la germanaj landoj daŭris la reformacio. Ankaŭ la juna urbo Homburg grave suferis per la tumultoj, kiuj kondukis al la 30-jara milito. Fortkastelo Homburg vidis trupojn el ĉiuj landoj de Eŭropo. Svedaj kaj imperiestraj soldatoj alternis. Nedaŭra stabiligado de la situacio komenciĝis nur je la fino de la 17-a jarcento, post kiam trupoj de la suna reĝo Ludoviko 14-a okupis la Homburgan landon.

Ĉirkaŭ jaroj 1680/81 komisie de la ministro pri milito Louvois la genia fortikarkitekto Vauban komencis transformi la malnovan Hohenburg en fortan fortikajon. La planoj de tiu fortikaĵo konserviĝis en pluraj arkivoj de Parizo. Pri la graveco de Homburg jam en la tiama tempo atestas la fakto, ke ni trovas bele desegnitajn planojn de la fortikajoj kaj urbo Homburg en la luksa kartaro de reĝo Ludoviko 14-a. La paco de Ryswick ĉesigis la francan okupadon. La fortikaĵo estis malkonstruita.

En jaro 1755 ekestis teritoria ŝanĝiĝo. Urbo Homburg venis al duklando Zweibrücken. La tiama duko, Kristiano 4-a de Palatinujo-Zweibrücken, estis grava princo, ŝatata de ĉiuj kiel akcelanto de la belaj artoj. En Parizo li havis beligan urban palacon, kiu fariĝis kultura centro. La enciklopediistoj Diderot kaj D'Alembert, la pentristoj Georges Wille kaj François Boucher estis ofte gastoj tie. Willibald von Gluck, la granda reforminto de la opero, loĝis dum longa tempo en la „Hotel Deux-Ponts” en Parizo. Sub la posteulo de Kristiano 4-a, la duko Karl August von Zweibrücken, transiĝis forta impulso de kultura kreado al la urbo. En jaro 1778 la duko rezignis pri la malnova glora urbo Zweibrücken, kiu ja iam estis la lulilo de la sveda reĝa domo, kiel sidejo, kaj konstruigis novan grandegan loĝejon en Homburg sur la Karlsberg. Tiu entrepreno ne estis arbitra ago. La duko de Zweibrücken estis rajtigita heredaĵo de ĉiuj landoj de la gento Wittelsbach kiel Kurpfalz, Kurbayern same kiel de la terposedaĵoj ĉe la Malsupra Rejno. La nova sidejo en Homburg devis fariĝi centro por la venontaj heredantoj de la

unuigita potenco de la landoj apartenantaj al gento Wittelsbach.

Tiu politika situacio pro la pasio pri arto de duko Karl August estigis kvaŝaŭ kulturalan revolucion: la nova loĝejo, la plej granda kampara loĝejo de la 18-a jarcento entute, estis trezorejo de elektitaj artaĵoj. Ne mirige, se ankaŭ eksterlandaj vizitantoj de la Homburga kastelo estis profunde impresataj pro la grandeco pro la altvalora instalaĵo de la kastelo.

La grava angla fizikisto Rumford juĝis, ke Kastelo Karlsberg estas „malgranda Ateno”.

Sed la brulado ne daŭris longe. En julio de jaro 1793 dum la bataloj de la Granda Revolucio la grandega kastelo estis komplete detruita. Parto de la artaĵoj estis fortransportita al sekura loko antaŭ la detruo de la kastelo. Multaj valoraj pentraĵoj el Homburg troviĝas hodiaŭ en la malnova pinakoteko de Munkeno. Post la morto de duko Karl August ties frato fariĝis elekto-princo de Kurpfalz kaj de Kurbayern kaj pli poste eĉ reĝo de Bavarujo kaj per tio fondinto de la nova bavara reĝa domo.

Do, dum la dua duono de la 18-a jarcento signifis por Homburg altan prosperadon, la politikaj okazintaĵoj alkondukis malleviĝon de la kultura evoluado.

Sed ankoraŭfoje urbo Homburg fariĝis centro de la publika intereso. En jaro 1832, la naskiĝa horo de la germana demokratio, laboris en Homburg du liberecemaj burĝoj: unu oficisto, la subdistriktestro d-ro Siebenpfeiffer, kaj la ĵurnalisto Wirth. Ambaŭ batalis por la forigo de la monarkio kaj iniciatis la faman Feston de Hambach, kie krom la germanaj respublikanoj multaj Francoj kaj Poloj festis la grandajn ideojn de la Franca Revolucio. La Homburganoj Siebenpfeiffer kaj Wirth proklamis interalie la presliberecon. Kvankam ilia agado unue ne atingis la celon, oni devas diri: ili iniciatis evoluadon, kiu havis decidan gravecon por la germana historio.

Tiuj ĉi mallongaj aludoj sufiĉu, por skizi proksimume la gravecon de Homburg. Ĝi estas urbo, en kiu la historio postlasis multajn studindajn postsignojn. La junaj Esperantistoj havos por malfermiĝi kun la historio de tiu 400-jara urbo.

Wilhelm Weber, trad. LKK

EŬROPA DOMO EN MARIENBERG

De ses jaroj estas fondita en Marienberg Eŭropa Domo, kun la celo konsciigi la Eŭropanojn pri la neceso de unuiĝo. Dum ĉi tiuj ses jaroj 11 mil gejunuloj el 36 landoj vizitis la Doman, okaze de la seminarioj por studentoj, de la studkunvenoj por junaj laboristoj, de la renkontiĝoj por rifuĝintoj, kiuj regule troviĝis en la jara programo de la aranĝoj.

Sed ĝis nun en neniu el ĉi tiuj manifestacioj, havantaj celon, sentiĝi al la junaj Eŭropanoj, ke ili formas unu komunumon, oni uzis la Internacian Ling-



Karlsberg-lageto, Homburg/Saar

von. Pri tio oni ne povas simple kulpigi la estraron de la Domo: estas ankaŭ vere, ke la esperantistoj ne montris intereson pri tiu institucio. Sed ne estas tro malfrue por komenci: ankaŭ dum ĉi tiu jaro la Domo havas sian riĉan programon, kaj kelkaj aŭ multaj junaj gesamideanoj estas invitataj, viziti unu aŭ kelkajn el la multenombraj manifestacioj. Tamen ne havas efikon la partopreno de unu aŭ du izoluloj en ĉiu programero: multe pli celtrafa estas ĉeesto de vigla grupo en tiuj aranĝoj, kiuj havas pli da intereso kaj estas pli vizitataj. Tiaj estas sendube la tri dektagaĵaj kunvenoj de la „Malgranda Loreley“, kies celo estas tre proksima al Esperanto-Kunvenoj: faciligi la renkontiĝon kaj la komunan vivon de junularo el diversaj nacioj kaj sociaj tavoloj, plilarĝigi la konon de la problemoj rilatantaj la eŭropan unuiĝon, amuziĝi per sporto, filmoj ktp. Plej bonvenaj estas la gejunuloj inter 16 kaj 21 jaroj, sed povas partopreni ankaŭ interesiĝantoj ĝis 25 jaroj.

La 3 dektagaĵaj periodoj okazos: 1-a: 23-7-1-8; 2-a: 4-8-13-8; 3-a: 18-8-27-8.

La interesuloj estas petataj, kontakti kiel eble plej baldaŭ kun la komisiito de TEJO pri la afero: Karl-Ernst Salzmann, Unterweg 12-14, Frankfurt/Main (Germanujo). Ili indiku: adreson, aĝon sekson, profesion, lingvojn, la plej konvenajn periodojn kaj la aliajn ankaŭ eblajn. Petante informojn ili ne forgesu aldoni respondkuponon.

La esperantistaj gejunuloj disponantaj pri iom da libera tempo dum ĉi tiu somero estas do varme invitataj al partopreno, kiun cetere rekomendas ankaŭ la ne alta kotizo (pasintjare 26 germ. m.). Ili havos okazon fari interesan sperton kaj alporti helpon al la junulara Esperanto-Movado.

MALLONGAJ INFORMOJ

• La junaj nederlandaj esperantistoj kunvenis la 8-9-an de februaro en Hago, kaj tie oni kunmetis kaj elektis provizoran komitaton por unu jaro: Jan Schaap, prezidanto; Adri de Haan, sekretario; Eddy Borsboom, kasisto. La adreso de la sekretario estas: Irenestraat 28a, Leiden. La tiel formita komitato havas regulan kontakton kun proks. 50 junaj esperantistoj. Kiel speciala propagandisto funkcias Hans Bakker Jr.

• En Ĉeĥoslovakujo la junularo de Trbič preparas jam la Someran Tendaron apud la valdiĝo de Vranoc. Oni planas lingvajn kursojn, internacian medion kaj bonan veteron. La akvon por banado oni jam prizorgis. Ankaŭ la junularo de Opava projektas unuetapan Someran Tendaron kun Junulara Seminario por la funkciuloj. La aranĝoj promesas esti bonkvalitaj, ĉar la junaj esperantistoj de Ĉeĥoslovakujo jam kolektis aron da kritikaj voĉoj, konsiloj ktp. post la pasintjaraj someraj tendaroj. La junulara movado en Ĉeĥoslovakujo, kvankam provizore ĝi ne havas centran oficialan organizon, ĉar Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista estas malfondita kaj

Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato ankoraŭ ne ekfunkciis, aktive laboras; la kontakto kun la membroj estas garantiata de la bulteno „Tagiĝo“, 24-paĝa mimeografita gazeto, redaktata de Jan Werner kaj Drah. Kočvara, Kamenec 251/3, Ostrava VIII, Ĉeĥoslovakujo.

• Esperanto-Ligo por Norda Ameriko fondis Provizoran TEJO-Komitaton de ELNA. Ĝin provizore direktos Charles Powell, Route 1, Box 41-A, Wimauma, Florida (Usono), 14-jara junulo, kiu tiel iĝas la plej juna landa reprezentanto de TEJO. Por helpi lian neeviteblan nespartecon, la estraro de ELNA apudmetis al li lian eksinstruiston, s-ro George E. Wagner, 403 East North St., Tampa 4, Florida (Usono).

JUNULARO DE LA MONDO

La revuo „La Junularo de la Mondo“, organo de Tutmonda Federacio de la Demokrata Junularo, Benczur ŭtca 34, Budapest VI (Hungarujo), en sia duobla numero 8-9 de 1957-a aperigis unupaĝan artikolon „Esperanto“. Se multe da gejunuloj petus la redakcion aperigi informojn pri la junulara Esperantomovado, oni ne povas nekonsideri la petojn. La revuo aperigas senpage adresojn de korespondemuloj. Montru al la redakcio kaj al la Federacio la utilecon de Esperanto por la junularaj internaciaj rilatoj. De tiuj ĉi instancoj multe dependas, ĉu Esperanto estos uzata pli grandskale dum la 7-a Internacia Junulara Festivalo.

Nikolaj Nicolov

SPECIALE POR PROTESTANTAJ GEJUNULOJ

Ekzistas en Nederlando interreligia fondajo „Oud-Poelgeest“, kiu havas centron en la malnova kastelo kun la sama nomo en Oegstgeest ĉe Leiden.

Multaj internaciaj kunvenoj tie ĉiujare okazas. Dum tiuj kunvenoj oni ofte uzas la anglan lingvon, sed ofte estas necese uzi pliajn lingvojn. Estas tre dezirinde, ke en tiuj kunvenoj ankaŭ venos esperantistoj por ke la gvidantoj kaj ĉeestantoj vidu la solvon de unu grava internacia problemo, de ili bezonatan.

Interalie de la 12-a ĝis la 19-a de julio estos semajno por Amerikaj kaj Eŭropaj gestudentoj, por ke estontaj Ameriko kaj Eŭropo pli bone konu unu la alian. Poste de la 24-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto okazos la 7-a interreligia Eŭropa junularkongreso. La temo de tiu kongreso estos: „La renkontiĝo de sudo, oriento kaj okcidento. Nia estonteco.“ En tiu kongreso do estos pritraktata la neceso por gejunuloj, prepariĝi por tute ŝanĝota mondo. Oni dum tiu kongreso uzos plurajn lingvojn. La kostoj estas nur 80,- ned. gld. Speciale la lastan kongreson ni rekomendas por protestantaj gejunuloj. Petu informojn al „Kasteel Oud-Poelgeest“ en Oegstgeest aŭ al s-ro E. J. Woessink, Vondellaan 47, Arnhem (Nederlando).

E. Woessink



El la ekspozicio de GRE (vd. sube).

Geografia rondo esperantista ĉe ŝtata liceo pedagogia en Ĉieszyn (Pollando)

Nia laboro por Esperanto komenciĝis en decembro 1956 per enkonduko de Esperanto en nian lernejon. Anoncis sin 46 gelernantoj kaj finis 32. Poste aliĝis al Geografia Rondo 25 esperantistoj.

Nun nia Geografia Rondo havas interrilaton kun eksterlandaj gelernantoj, geinstruistoj, organizaĵoj, per vigla korespondado. La celo de nia korespondado estas intersanĝo de bildkartoj, landkartoj kaj turismaj prospektoj. Tiun ĉi materialon ni uzas por lerni geografion. Ĉiujn ricevitajn leterojn, kartojn kaj aliajn bildojn ni ekspozicias en du murkestetoj,

kaj ni uzas ilin en la geografia leciono.

Ankaŭ la novaj lernantoj, kvankam la kursoj ankoraŭ ne estas finitaj, jam tre vigle korespondas kun 15 landoj kaj ricevas diversajn geografiaĵojn.

Ni aranĝis ekspozicion de ĉiuj eksterlandaj korespondadoj dum instruista konferenco en februaro. La ekspozicion vizitis 120 geinstruistoj, 200 personoj partoprenantaj kooperativan kunvenon kaj 350 gelernantoj.

Ĉar en la Stata Liceo Pedagogia la junularo estas tre okupita, ankaŭ per flankaj laboroj, la esperantistaj kunvenoj okazas dufoje en la monato. Krome okazas ĉiudimanĉe kunveno ĉe la Filio de la Asocio Esperantista en Ĉieszyn (Cieŝen).

Juzwowa Stefania

Tra la mondo

• **Esperanto en la dana radio.** Dimanĉon, la 4an de majo, je horo 10.35 MET, okazis 20-minuta elsendo de la dana radio: „Knud Rasmussen kaj la eskima poezio”. Prelego de instruisto Poul Thorsen. Ondolongoj 188 m, 202 m, 210 m, 283 m (krom por loka ricevo t.n. FM-frekvencoj). Aŭskultinte — kaj ankaŭ neaŭskultinte — danku al Statsradiofonien, Radiohuset, Kopenhago V, petante pli da privilegioj en Esperanto, kaj eventuale proponu temojn, kiuj havas vian intereson. Estas vere grave por nia komuna afero, se tre multaj samideanoj serioze kaj pozitive kunhelpos por vastigi tiun breĉon.

• **Aperis la Dua Oficiala Bulteno de la 43a U.K.** La nunjara Dua Bulteno estas la plej ampleksa, laŭ nombro de paĝoj kaj informriĉeco, el ĉiuj ĝis nun aperintaj. Ĝi havas 28 paĝojn plus 4 kovrilpaĝoj, kun ĝeneralaj informoj, Regularoj de la Belarta Konkurso kaj Oratora Konkurso, kaj provizora programo de la U.K. en sep ĉapitroj. Ĝi estas senpage ricevebla, nur de kongresanoj.

• **Nacilingvaj tradukoj de grava Esperanta verko.** La grava verko „La vivo de la plantoj” de D-ro Paul Neergaard, kiu lastatempe estis eldonita de Stafeto (La Laguna), jam aperis en la lingvoj dana, sveda kaj finna, kaj Varsovia eldonejo ĵus decidis publikigi ĝin en pola traduko. La dana ŝtato krome aperigis braĵlan eldonon (kion ĝi ĉiujare faras pri la 4—6 plej bonaj danaj libroj de la jaro, do vera komplimento). Per tiaj nacilingvaj tradukoj el Esperanta originalo oni multon faras por plialtigi la prestiĝon de la Internacia Lingvo.

• **Kunlaboro de du kopenhagaj kluboj.** Kun plezuro ni sciigis, ke du el la multaj Esperanto-kluboj en Kopenhago, Komuna Konversacia Klubo kaj Studenta Esperanto Klubo, tranĉante tra ĉiuj diskutoj kaj disputoj, ekde la 1-a de aprilo aperigas komunan gazeton „Kuriero”, kaj ankaŭ la kunvenoj de la du kluboj estas ordinare komunaj.

• **Unuataga poŝtstampo.** Okaze de la 50a Nacia Kongreso de la Unio Esperantista Franca (Bordeaux, la 25an de majo 1958) unuataga ilustrita grandformata stampilo estos uzata en la speciala poŝtoficejo de la kongresejo. Tiuj, kiuj deziras ricevi unu aŭ plurajn memorajojn, povas mendi ilin senprokraste al Congrès National d'Espéranto, 25 rue de Lyon, Bordeaux, Poŝtĉekkonto Bordeaux No. 2000-66. Jen la aĉeteblaj memorajoj: 6 poŝtkartoj po 50, 55 kaj 60 francaj frankoj (laŭ la surgluita poŝtmarko); 1 koverto po 50, 60 aŭ 75 fr. fr. (laŭ la surgluita pm). La paĝon, kiu devas akompani la mendilon, oni povas sendi ankaŭ per rpk (1 rpk = 35 fr. fr.) aŭ per steloj de la UL (1 stelo = 30 fr. fr.).

• **Trafa artikolo en „The World Federalist”.** En „The World Federalist” (La Mondfederalisto), eldonata en Amsterdam, Vol. 5, n-ro 1, februaro 1958, aperis, sub titolo „A true internationality” (vera internacieco), la artikolo de D-ro I. Lapenna, „70 jaroj de la Internacia Lingvo”, en anglalingva traduko. Tiu artikolo, en diversaj lingvoj, jam aperis en pli ol 100 gazetoj kaj revuoj.

• **Esperantaj volumoj en parlamenta biblioteko.** Okaze de la solena malfermo de la Jubilea Kongreso de Brita Esperantista Asocio, la 4an de aprilo, en Edinburgo (Skotlando), Lordo Mathers oficiale akceptis por la biblioteko de la Supera Cambro de la brita parlamento du librojn en la Internacia Lingvo: la Biblion kaj la Anglan Antologion I. Ili estos la unuaj Esperantaj verkoj en tiu valora biblioteko.

• **Grava inĝeniera revuo enhavas resumojn en Esperanto.** Por la unua fojo en Italujo, se ne en la mondo, grava revuo pri mehanika inĝenierarto publikigas, apud resumojn en la franca, la germana kaj la angla, ankaŭ resumojn en Esperanto. Tiu revuo estas „Ingegneria Meccanica” (Via Fantoni 14, Milano, Italujo), kaj ĝia januara numero enhavis resumojn pri artikoloj kiel ekzemple „Grafika kalkulado de preminfluitaj cilindraj kaj sferaj rezervujoj”, kaj multaj aliaj. Esperantistaj inĝenieroj, precipe el orientaj kaj aziaj landoj, petu ekzemplon al la supra adreso.

• **Konferenco de Esperanto-Ligo Israellanda.** La 6an kaj 7an de aprilo okazis en Tel Aviv la 6a tutlanda konferenco de ELI.

• **Esperanto en Danlando.** Dum februaro kaj marto viclernejestro Føttinger, Salzburg, Aŭstrujo, prelegis en Danlando, kaj montris lumbildojn pri sia lando kaj urbo. Lia filino edziniĝis en decembro kun juna dano, ambaŭ fervoraj esperantistoj. Fine de marto kaj komence de aprilo japana ĵurnalistino Joŝika Kaĝino ankaŭ faris prelegvojaĝon tra Danujo. Je pentekosto la landa asocio CDEL festos sian jubileon dum la ĵarkunveno en Kopenhago. Oni intencas prezenti la unuan Esperanto-operon komponitan de dano, Kaj Rosenberg, esperantisto dum du jaroj. Ĝia titolo estas „Ulrik kaj Loise, aŭ, Rabisto kaj knabino”, kaj ĝi estas jam dufoje prezentita kun granda sukceso.

• **„RIDET” ekiris.** En nia decembra numero ni informis pri la fondiĝo de Rondo Internacia De Esperantistoj-Tradukistoj. Jam aperis la unua kajero eldonita de tiu rondo. Interesatoj turnu sin al: S-ro J. M. J. Driesen, Sam. Mullerstraat 7a, Rotterdam, Nederlando.

• **Studenta Klubo Esperantista en Torun.** Ĉe Universitato de Nikolao Kopernik en Torun (Pollando) oni fondis Studentan Klubon Esperantistan. Ĝe-

klubanoj volas fari kontaktojn kun similaj studentaj esperantistaj kluboj el diversaj landoj kaj kunlabori kun internacia studenta esperantista gazeto eldonata en Kopenhago.

• **Esperanto helpas la metion.** S-ro O. Koen, librobindisto en Naharja (Israelo), informiĝis pere de Esperanto pri du novaj metodoj de librobindado (aluminokovriloj kaj bindmetodo „Lumbek”) kaj dank’ al tio li povis la unua enkonduki tiujn novajn metodojn en sian landon.

• **Nova Esperanto-monumento.** La 15an de decembro oni inaŭguris en Belo Horizonte, ĉefurbo de la brazila ŝtato Minas Gerais, obeliskon el marmoro en la Placo Esperanto. Tiun monumenton donacis al la urbo la tieaj esperantistoj okaze de ĝia 60a datreveno. En la sama urbo jam staras alia monumento kun Zamenhof-busto el bronzo, inaŭgurita la 17an de decembro 1950.

• **Revigliĝo de nia movado en Palma de Malloro.** La delegito de UEA en Palma de Malloro, Hispanujo, sukcesis vekti intereson por nia afero, kaj komencis kurson kun 30 ĝelernantoj.

• **Esperanto ĉe Internacia Federacio pri Kampismo kaj Loĝveturilismo.** Kun la celo plifirmigi la amikajn ligojn de siaj membroj, la Internacia Federacio pri Kampismo kaj Loĝveturilismo (FICC) esprimis sin favore al Esperanto dum sia kongreso, kiu okazis en aŭgusto 1957 en Stuttgart. Nunjare, okaze de la XIXa Internacia Kunveno, kiu lokiĝos proksime al Bruselo, F.I.C.C. decidis ekplenumi la tradukon en Esperanton de ĉiuj komunikaĵoj, kiuj estos senditaj al la partoprenantoj. Niajn gratulojn kaj dankon al la estraranoj de F.I.C.C.

• **Kurso en Pazarĝik.** De la 4a de februaro la Esperanto-societo „Radio” en Pazarĝik, Bulgarujo, aranĝis kurson por ĝeinstruistoj gimnaziaj, kiun gvidas Petro Arnaudov.

• **Internaciaj feriaj kursoj en Helsinger.** Kiel kutime s-ro L. Friis (Inge-mannsvej 9, Aabyhøj, Danlando) gvidos en 1958 Internaciajn Feriajn Kursojn en Elsinoro, de la 19a ĝis la 26a de julio. Tion li faris jam de pli ol 25 jaroj, kaj tiuj kursoj estas konataj kun granda aprobo tra la monda esperantistaro. Petu prospekton, kaj aliĝu antaŭ la 15a de junio.

• **La esperantistaj studentoj de Parizo** ĵus kreis gazeton, tute en Esperanto, kies nomo estas „La Esperantista Studento”. La abono estas 150 fr. fr. (6 steloj). Adreso: „La Esperantista Studento”, 34 rue de Chabrol, Paris X, Francujo.

• **Esperantistaj seminario kaj konferenco en Olomouc.** De la 21a ĝis 25a de januaro okazis en Olomouc (Ĉeĥoslovakio) seminario kun altkvalitaj pre-



Lia Kardinala Moŝto, D-ro Joseph Wendel, ĉefepiskopo de München-Freising, akceptis la 18an de januaro 1958 dum duonhora aŭdienco delegacion de la munkenaj katolikaj esperantistoj.



Membroj de la Massachusetts Grupo de la Usona Sekcio de la Skolta Esperantista Ligo en Brookline, Mass., Usono. La skoltoj uzas Esperanton por korespondi kun fratskoltoj tra la mondo. Gvidanto: Thomas Duncan.

lejoj en Esperanto. La 26an okazis laborkonferenco. 82 esperantistoj el 31 lokoj partoprenis.

• „La Ora Sago”. La sudorienta federacio de Brita Esperantista Asocio eldonas interesan ligilon sub titolo „La ora sago”. Sekretario: Inĝ. Marcello Caselli, 122 Main Road, Sidcup, Kent, Britujo.

• Esperanto en Lerneja Gazeto. Esperanto ludas gravan rolon en la vivo de Temple County Secondary School, Rochester, Kent, Anglujo. En la lerneja gazeto aperas paĝo en Esperanto; sed krom tio, multaj lerneĵanoj, skribante anglalingve pri diversaj temoj, utiligas la okazon por montri, kiel Esperanto kontribuis al ilia vivo. Tio estas tre trafa propagando pri la praktika utileco de la Internacia Lingvo.

• Hungara Ministro por Esperanto. S-ro István Kossa, gvidantara membro de la hungara laborista partio, ministro por trafiko kaj poŝtaferoj, skribis en letero al la Hungara Landa Esperanto-Konsilantaro, ke la Partio kaj la Registaro apogas la Esperanto-Movadon. Laŭ lia deklaro Esperanto estas necesa ne nur kiel kultura faktoro, sed kiel helpilo por la internaciaj komerco kaj turismo. Raportis la partia ĵurnalo.

• 11a Kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia en 1958. KELI aranĝos ĉijare kongreson en Würzburg, Germanujo, de la 36a de julio ĝis la 2a de aŭgusto. Ĉeftemo de la kongreso estos: „K.E.L.I. kaj la eklezioj”. Petu informojn kaj aliĝilon ĉe pastoro R. Hoppe, 13a Auerbach über Ansbach, (Mittelfr.), Germanujo.

• Esperanto-kurso en Radio IBRA. Antaŭa Prezidanto de UEA s-ro Ernfrid Malmgren gvidas Esperanto-kurson per Radio IBRA (20.2 m, 26.5 m, 30.3 m). En kunligo kun tiu kurso estas eldonita lernolibro „Allas Andra Språk Esperanto”, bela kaj bonega lernilo verkita de

s-ro Malmgren, eldonita de Förlagsföreningen Esperanto, Malmö.

• Nova klubo en Bourges. En la instruistina seminario en Bourges (Cher), Francujo, dank' al la iniciato de la estrino f-ino Bertrand, kaj sub la gvidado de f-ino S. Bontemps, finklasa lernantino, kreiĝis Esperanto-klubo kun 28 aninoj de la 1-a kaj 4a klasoj. Estus bone se el multaj lokoj oni gratulus la seminariostrinon pro la dankinda laboro. Jen ŝia adreso: F-ino Bertrand, Directrice Ecole Normale, Rue J. J. Rousseau, Bourges (Cher), Francujo.

• Ekspozicio en Madrid. Madrida Esperanto-Klubo organizis ekspozicion la 23an de decembro 1957. Elstaran lokon ricevis la UNESKO-afiŝoj eldonitaj kun Esperanto-teksto.

• Novaj prospektoj en la Internacia Lingvo. Ĝis eldonis novan faldprospekton en Esperanto Mainz, la urbo de nia 43a U.K., en 10.000 ekzempleroj. Oni povas ricevi ĝin de: Städt. Presseamt, Mainz, Germanujo. Alia germana urbo, Bonn, aldonis informojn en Esperanto al siaj diverslingvaj prospektoj. Petu ĉe: Delegito de UEA Ernst Kind, Nordstrasse 97, Bonn, Germanujo. La ĉeĥoslovaka turisma oficejo (Praha 3, Na prikope 18) ankaŭ eldonis faldprospekton „Ĉeĥoslovakio” tute en Esperanto. Skribu al la donita adreso. El Romans (Drome), Francujo, venas prospekto kun la klarigoj al la bildoj presitaj ankaŭ en Esperanto. Adreso: Syndicat d'Initiatives de Romans, Place Jules Nadi, Romans (Drome), Francujo. Denove al Germanujo: Karlsruhe eldonis esperandlingvan aldonon al sia germanlingva prospekto samnoma. Ricevebla ĉe: Verkehrsverein, Karlsruhe, Germanujo. Ni ricevis ankaŭ ekzemplerojn de la novaj prospektaj libretoj en Esperanto eldonitaj de la Germanaj Fervojoj, kiujn ni jam anoncis en tiu ĉi revuo, kaj ili estas vere belegaj kaj posedindaj. Unu el ili, kiel ni jam skribis, enhavas de-

segnajojn de la mondfama karikaturisto franca, Daumier. Sur la kampo de la informado pri Esperanto aperis du novaj informiletoj: danlingve, Verden bliver mindre og mindre eldonita de Esperantistforeningen for Danmark (Vejlemosevej 60, Holte, Danujo), kaj anglalingve „The world is getting smaller and smaller” eldonita de The Esperanto League for North America, Meadville, Pa., Usono.

• Esperanto en la gazetaro. En „Lo gai saber” (Toulouse) aperis raporto pri Esperanto-ekspozicio en Toulouse. Nia malnova amiko „Arts Cheminots” dediĉis unu paĝon en sia numero 22 al Esperanto, raportante pri la studferio „Kulturoj kaj Civilizoj de la Mondo” en Grésillon pasintjare kaj al aliaj sciigoj pri la esperantista vivo. Alia bona amiko, „Ilustrowany Kurier Polski”, daŭrigis siajn preskaŭ ĉiutagajn informojn kaj artikolojn pri la Esperantomovado. „Kulisy”, (282,714 ekzempleroj, Wrocław), kiu per la influo de Mag, phil. Miecisław Zgórzecki aperigas artikolojn pri Esperanto, deziras tiucele ricevi materialon, kiun oni sendu per Mag. Zgórzewski, skrytka pocztowa 22, Wrocław 2, Pollando. „Die Heimat am Mittag” (Hattingen, Ruhr) aperigis artikolon „Vivu Esperanto!” laŭ raporto de August Wetterstein, kaj letero de la sama esperantisto aperis en „Anzeiger für Hattingen”. „Dala-Demokraten (Svedujo) aperigas kurson por komencantoj. Letero de George E. Wagner aperis en „Tampa Morning Tribune” (Usono).

• Per Esperanto ĉirkaŭ la mondo. En la februara programo de la granda Kulturdomo de MOM/Hungaraj Optikaj Uzinoj en Budapeŝto estis anoncita parolado „Per Esperanto ĉirkaŭ la mondo”. Ĝin faris antaŭ 50 personoj s-ano P. Balkányi, kiu en la dua parto de la prelego prezentis malnovajn lumbildojn el la movado. Li ĝuste detale konigis la kulturan kaj amikigan valoron de Esperanto kaj ĝian efikan uzon en la pac-

movado, kiam enpaŝis bulgara gasto, s-ano Ivan Iliev kaj transdonis la salutojn de la bulgaraj kaj sofiaj esperantistoj. La publiko povis tuj sperti la veron pri la senpera interkompreniĝo, ĉar li rakontis — kun tujaj interpretoj de s-ano Balkányi — mallonge sian vivon, sian esperantistiĝon, kio donis la impulson al plua lernado. Interese li priskribis epizodojn, kiuj pruvis, ke esperantistoj, la portado de la insigno, la havo de adresoj eĉ en proksima Oriento multe helpis lin kaj ebligis rektan konatiĝon kun la tieaj loĝantoj kaj kun la interesaj vidindaĵoj. Pri tio li skribis bulgare libreton kun titolo „En ombro de la piramidoj”, kio bone propagandis en Bulgarujo la internacian lingvon. En la nomita Kulturdomo fondiĝis nova Esperanto-fakrondo.

● **Esperanto helpas al Hungara Malsanulejo.** La hospitalo en hungara urbeto Siklós ricevis de la Ruĝa Kruco sekigitan miksitajn sangon plasmon. Sed la klariga teksto estis en ĉeĥa lingvo, kiun tie neniu komprenis. Antaŭ nelonge lernis tie gimnazia profesoro Jozefo Kárpáti Esperanton kaj jam fondis lernejan grupon kaj havas internacian korespondadon. Lia edzino estas akuŝistino en la menciita hospitalo kaj oni donis al ŝi la tekston por la edzo. Tiu tuj sendis ĝin al amika ĉeĥoslovaka Esperantista Klubo en Jihlava kaj baldaŭ revenis la traduko. Tiun hungaren tradukis s-ano Kárpáti kaj la hospitalo nun povis kontentige uzi la gravan helpilon.

● **La Verda Kolombejo.** „La estro de la loka sidejo de la nacia oficiala organizo „Educación y Descanso” afable disponigis konvenan ejon por la Esperanto-Grupo LA VERDA KOLOMBEJO, en El Entrego. Tre interesa por nia afero estas amasa gratulo. Adreso: Sr. Jefe de la Obra Sindical „Educación y Descanso”, El Entrego, Oviedo, Hispanio.”

● **Speciala Poŝtofiĉejo en Mainz.** Estas planite, funkciigi dum la Universala Kongreso en Mainz specialan poŝtofiĉejon kun esperantoparolanta perso-

naro. Post kiam la poŝta kaj telegrafa oficejoj en Mainz estis kompreneme alvokitaj la personaron, partopreni Esperanto-kurson, anoncis sin 15 geoficistoj (precipe junaj), kiuj nun ekde januaro sub la gvidado de s-ano Joliet diligente lernas kaj laŭ la ĝisnunaj progresoj atingos la fiksitan celon.

● **Ĉiutage...** Ek de la 3-a de Marto 1958 funkcias duonhora ĉiutaga kurso de Esperanto per Rádio Mundial, de Legio de Bona Volo, en Rio de Janeiro, Brazilo. Jam de longa tempo estis lecionoj de Esperanto per tiu Radio, sed ili estis nur dimanĉe matene. La Estraro de Kultura Kooperativo de Esperantistoj vizitis la Prezidanton de L.B.V. por danki la bonegan laboron tie faratan por Esperanto, kaj la Prezidanto mem, S-ro Alziro Zarur, tiam diris al la kooperativanoj: „Jes, sed Esperanto ĉe L.B.V. ne estu nur dimanĉa meso; ĝi estu ĉiutaga pano!” Kaj efektive li organizis ĉiutagajn lecionojn de la 6-a ĝis duono antaŭ la sepa.

L.B.V. kreskas tre rapide kaj jam havas ĉirkaŭ cent mil membrojn disemitaĵojn tra la tuta brazila teritorio. Tiuj fervoraj membroj aŭskultas kun religia pieco ĉiujn programojn de „Radio Mundial”. De nun ilia unua devo ĉiumatene estas leciono de Esperanto.

L.B.V. kreis ankaŭ la funkcion de esperantista inspektoro por helpi kaj konsili ĉe la grupoj tra la tuta lando. Tiun devon plenumas nia fervora samideano Petro Lima Brenneissen, loĝanta en Salvador, Bahia, sed senĉese vojaĝanta tra la lando. Esperanto fariĝis do religia devo por la fervoraj legianoj de Bona Volo. Espereble de nun Esperanto progresos multe pli rapide en Brazilo.

● **Internaciaj FERIAJ Kursoj „Esperanto kaj Geonismo” en Kastelo MUENCHENWILER, apud Murten-Morat, Svislando.** Jus aperis sespaĝa prospekto pri tiuj ĉiujaraj kursoj, kiuj okazos ĉifoje de la 10-a ĝis la 17-a de aŭgusto 1958, do tuj post la Universala Kongreso en Mainz. La plaĉa ilustrita do-

kumento prezentas la programon de la Supera Kurso, kie alternas studo, kunlaboro, instruo, liberaj horoj, ripozo en la kastelaj parko aŭ arbaro, prelegoj, debatoj, muziko, ludoj, filmoj. Esperanto estas instruata laŭ la rapida „Ora Metodo” de D-ro W. Perrenoud, direktoro de la kursoj. Komencantoj havas agrablajn kurson elementan, kun uzo de la frekvent-listo de Profesoro P. Bovet. La Geonismo kreas aktivan harmonion inter homoj, respektante kaj ŝatante ĉies devenon aŭ apartenon. La prospekto estas havebla senpage ĉe Svisa Esperanto-Instituto, Breitenrainstrasse 12, Bern (Svislando). Tempolimo por enskriboj: 12-an de julio 1958; poste sen garantio.

● **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.** Ĉiujare en sia programo dum la Kongreso de U.E.A. la Ligo aranĝas diskutadon pri profesia temo por doni okazon al la gekolegoj el multaj landoj kompari spertojn kaj reciproke informiĝi. La nunjara temo estas: - „Instruistaj ferioj - ĉu tro longaj - ĉu oportunaj laŭ datoj - kiel uzataj?” La Centra Oficejo - 183, Woodlands Park Road, Birmingham, 30, Anglujo bonvenigos la nomojn de gekolegoj partoprenontaj.

La Esperanto-Unuiĝo de Germanaj Instruistoj (Membro-asocio de I.L.E.I.) proponas du seminariojn dum la semajno 25-31 Julio, dum kiuj gekolegoj povos renkontiĝi en agrablaj ĉirkaŭaĵoj. Unu estos en Hustedt bei Celle (Hannover) por nordanoj, kaj la alia en Hasselborn (Taunus) por sudanoj (en kaj ekster Germanujo). Tiu en Hustedt okazos en Popolalirnejo - pago proksimume 5.50 DM tage; tiu en Hasselborn aŭ sub tendo aŭ en najbara vilaĝo (proks. 6.50 DM tage). Ĉe Hasselborn estas projekto okazigi samtempe programon de la Internacia Geografia Asocio. Ĉar oni devas baldaŭ konfirmi aranĝojn, bonvolu skribi, kun r.k., pri aliĝo al Heinrich Müller, Hannover, Mommsenstr. 5/1, aŭ (por Hasselborn) al S-ino Bepperling, Wetzlar, Gr. Promenade, 2a. Germanujo.



La 29an de decembro 1957 okazis la unua Esperanto-ekspozicio en Funchal (Portugalujo). Ĝin vizitis kaj montris grandan intereson (de maldekstre) la militista guberniestro, la Urbestro kaj la Episkopo.



Kurso ĉe la Centro Espirita Fê Esperanca e Caridade en Uberlândia, Brazilo, sukcese finiĝis per festa disdonado de diplomoj al la junaj gelearnantoj.

Novaj fortoj en la gazetaro

Internacia Pedagogia Revuo aperos en 1958 per ses ilustritaj kajeroj 16-paĝaj, kun plaĉa ilustrita kovrilo dukolora. Ĝi entenas artikolojn kaj informojn de ĝenerala intereso por ĉiu instruisto kaj pedagogo; krome ĝi dediĉos spacon al la specialaj problemoj de la Esperanto-instruado kaj de la enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn. Ĝi publikigas la komunikaĵojn de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

La unua kajero de tiu ĉi renovigita kaj multe plibonigita faka revuo pravas ĝian indecon preni taŭgan lokon inter la pedagogiaj revuoj de la mondo. Ĝi enhavas artikolojn pri la edukistoj en Danujo, Hungarujo kaj Anglujo, omaĝon al la granda edukisto Comenius, kune kun artikolo de P. Balkanyi pri la (ĉie sentataj) problemoj de la „nuntempa junularo“ kaj recenzoj pri porinfanaj libroj. Artikolo pri la infana pentroarto kompletigas kajeron jam tre valoran kaj aŭgurantan tre gravan estontecon.

Ni tre firme rekomendas la revuon al la profesiaj edukistoj kaj pedagogoj, kaj ankaŭ al ĉiuj Esperanto-instruantoj, fakte al ĉiuj, kiuj interesiĝas ne nur pri la instruado, sed ankaŭ pri la enkonduko de la Internacia Lingvo en la lernejojn. La jarabono estas 500 fr. fr. (20 steloj), kaj la revuo estas mendebla pere de UEA.

Bulteno Gepatra, sendependa revuo por dulingva edukado, de kiu jam aperis 58 numeroj en multobligita formo, ankaŭ faris gravan paŝon antaŭen. Per la februara numero tiu ĉi tre valora kaj interesa bulteno por tiuj, kiuj interesiĝas pri la kreado de denaskaj esperantistoj, paŝis sur la kampon de la presitaj gazetoj. La kajero estas 24-paĝa, presita sur tre bona papero, kaj enhavas artikolojn pri la dulingva edukado de infanoj, kune kun materialo taŭga por la distro kaj intereso de infanoj (materialo, kiu ĝis nun neniam estis sufiĉe abunda). La kotizo restas libervola, kaj pagojn oni sendu al: Esperanto-Press, Oakville, Ont., Kanado.

Kun granda plezuro ni bonvenigas tri novajn gazetojn:

Armena Esperantisto (monata literatur-kultura-lerna bulteno de Armena Organiza-komitato Esperantista) aperas sub aŭspicio de Erevana Ŝtata Universitato. La redaktoro estas Prof. D-ro Gurgeno Sevak (Poŝt-kesto 78, Erevan, Armenio, Sovetunio). Ĉiu numero kostas 1 rublon; sendube eksterlandanoj povas aranĝi pagon laŭ interkonsento kun la redaktoro. La unua numero havas 16 paĝojn proksimume samformatajn kiel „*Esperanto*“, kaj estas agrable presita. Krom 4 paĝoj de materialo por lernantoj, la tuto estas en Esperanto, kaj estas vere interesa: „El la armena literaturo“, „Niaj famaj sciencistoj“, ktp. „*Ne konkuri, sed konkuri* kun la jam ekzistantaj Esperantaj periodaĵoj...“ estas la devizo de tiu ĉi

postulo de la iama „*Kaŭkaza Esperantisto*“.

Multobligita, sed klare legebla, kun alloga kovrilo, estas la 24-paĝa grandformatata decembra numero de „*Esperanto*“ (informa bulteno de la Iniciata Komitato por Esperanto de la Rumana Popola Respubliko). La prezo ne estas montrita, sed la korespondadreso estas: Casuta postala Nr. 205, Bucuresti, Rumanujo.

La Verda Vojo estas nova monata revuo, dediĉita al popularigo de la Esperanto-Movado kaj presita en pola kaj esperanta lingvoj. (La sama teksto estas presita paralele en la du lingvoj). Inter multaj interesaj artikoloj en la unua numero troviĝas ankaŭ, en la du lingvoj, la novelo „*Vekiĝo*“ de Edwin de Kock, premiita en la Belarta Konkurso 1957 kaj presita en nia januara numero. La redakcio petas, ke oni sendu artikolojn, notojn pri la vivo de la esperantistaro, rememorigojn, raportojn, rakontojn, k.a. Por la taŭgaj materialoj ili pagos per esperantaj eldonaĵoj. Unu numero kostas 3 rpk, kvaronjara abono: 9 rpk, duonjara abono: 16 rpk, jarabono: 30 rpk. Mendojn sendu al: Redakcio de „*La Verda Vojo*“, Warszawa 40, poŝtkesto 16, Pollando. Estas tamen bedaŭrinde, ke la presejo ne posedas la supersignitajn literojn, kaj sekve uzas la anstataŭaĵojn „gh“, „ch“, k.s.

Iom alia estas la nova revuo „*Kosmo*“, trimonata revuo eldonata de Esperanto-Sekcio de La Spiritscienca Instituto de Martinus. Ĝi celas disvastigi la kosmajn analizojn de la dana filozofo Martinus (kiel konate, la Instituto jam eldonis kvin librojn en Esperanto). La aspekto de tiu ĉi revuo estas vere agrable (zorgita de Hamberg kaj Eberhard), kaj la papero estas altkvalita. La enhavo ankaŭ estas interesa, kaj ne nur la „esperantistoj en 30 diversaj landoj“ kiuj aĉetis la verkojn de Martinus, sed ankaŭ multaj aliaj, volonte legos ĝin. La abonprezo estas 6 danaj kronoj, 10 rpk aŭ 12 steloj. Adreso: Mariendalsvej 94-96, Kopenhago, Danujo.

Estas konvene mencii ĉi tie ankaŭ „*Les cahiers de Grésillon*“, revuo de la konata Esperantista Kulturdomo en Baugé, Francujo. Simpla abono kostas 200 fr. fr. (20 steloj); subtenanta membro pagas 1000 fr. fr. (40 steloj). Adreso: Maison Culturelle Esperantiste, Château de Grésillon, Baugé (Maine-et-Loire), Francujo.

„*Vegetarano*“, organo de Tutmonda Esperanta Vegetara Asocio estas alia bele presita revuo, kaj certe estas rekomendinda por ĉiuj, kiuj interesiĝas pri la vegetarismo. La abonprezo estas 4 rpk, aŭ egalvaloro, kaj interesiĝantoj devus turni sin al: s-ro A. Andriu, à Salusses par Montsalés (Aveyron), Francujo.

Al unu popolana kunhomaro estas SAT-informilo por la sektoroj 5-12 (malproksima oriento), aperas kvaronjare ĉe A. C. Blatt, Box 926 Central PO, Tokio, Japanujo, kaj kostas \$ 0.28, 4 rpk, 100 jenoj, aŭ egalvaloro.

Libro-sugesto de la monato

En tiu ĉi rubriko ni intencas proponi ĉiunmonate iun libron al la atento de niaj legantoj. Tamen ni sugestos nur librojn eldonitajn antaŭ pli ol kvin jaroj. Tiel ni esperas atentigi legemulojn pri libroj, ankoraŭ aĉeteblaj, kiujn ili eble siatempe preteratentis, kaj ankaŭ rekomendi al novaj esperantistoj librojn, eble recenzitajn antaŭ ol ili lernis la lingvon. Nia libro-sugesto por la nuna monato estas:

SOVAĜA HERBARO de Lu Sin.

belegaj noveloj, en modela Esperanto, tradukitaj el la ĉina de S. J. Sŭ.
65 paĝoj, prezo: 1,50 gld. (6 steloj).
Mendebla ĉe UEA.

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Oficiala Servo de U.E.A.

Mi petas la tutmondajn korespondemulojn, ke ili bonvolu ne fari novajn petojn al Koresponda Servo Mondskala dum du monatoj, t.e. dum la monatoj majo kaj junio, ĉar dum tiu tempo, mi estas okupata per la preparado de grava ekzameno kaj ne havos ĝis fine de junio sufiĉan tempon por respondi al novaj petantoj pri korespondadreso.

Mi petas pardonon pro tiu dumonata interrompo de mia servado, sed mi firme esperas, ke ĝiaj uzantoj estos komprenemaj, konsiderante ke kiel studento mi preparas mian estontecon kaj tiun de mia familio. Mi ja estas sola prizorganto kaj deĵoranto por tiu servo *mondskala*, kaj memorigas tiuokaze, ke mi danke akceptos helpadon diverslandan por unuflanke dividi inter pluraj deĵorantoj mian pezan taskon, kaj aliflanke por plivastigi K.S.M., ke ĝi iĝu pli kaj pli mondskala.

Komprenible, dum tiuj du monatoj (majo kaj junio), mi povos daŭre registri novajn slipojn de adresdisponigantoj, respondintaj al la ok demandoj jam plurfoje priskribitaj ĉi tie, sed persone respondi, tion mi povos fari nur ekde julio, kiam rekomenciĝos la normala funkciado de la servo.

Personoj, kiuj estos skribintaj al la Servo antaŭ la apero de tiu ĉi artikolo, komprenible ricevos respondon kiel eble plej frue.

Daniel LUEZ, Laon (Aisne), Francujo.

• La Estraro de UEA akceptis la proponon de la Estraro de TEJO, asigni al TEJO kromsubvencio de 150 guld. kaj principe agnoski en la buĝeto por 1959-a subvencio de 500 guld.

• Estas fondita Korea Studenta Esperanto-Federacio, kies prezidanto estas la 19-jara studento Taekeng Kim, ĉe prof. Hengyi Hong, 634-2 Ha-Dong, Taegu (Koreo); ĝi publikigas semajnan bultenon, „*La Tagiĝo*“.

43-A UNIVERSALA KONGRESO

Mainz — 2-9 aŭgusto 1958 —

Germanujo

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 7

Aprilo 1958

Nova Karavano:

Centra Dana Esperantista Ligo agnoskas la karavanon de S-ro S.K. Nielsen, Havepladsvej. 129, Fredericia, Danlando.

Novaj Fakkunvenoj:

Anoncas fakkunvenon:

— Esperanta Ŝak-Ligo Internacia, D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakujo.

— Veterana Esperantista Ligo; diskutemo „Frujaroj de nia Movado”.

— Internacia Scienca Asocio Esperantista, Prof. Boj. Popoviĉ, Zagrebĉka 18, Sarajevo, Jugoslavio.

— Esperanto-Sekcio de la Nacia Spiritista Konsilantaro de Bahaoj pri „Bahaa Mondreligio: kial ni bezonas ĝin?”. Adreso: S-ro Voldemaro von der Ley, Ulrichstr. 18, Tailfingen/Württ.

— Internacia Verkista Asocio, Adreso: S-ro W. Auld, Knockfarril, Thornsideroad, Johnstone, Renfr., Britujo.

— Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (fondkunveno). S-ro Sven Ziegler, Bjernedevej 62, Kopenhago Brh. Danlando.

I.S.U.

Prof. Gaston Waringhien prelegos pri „Henriko Heine”.

Muzika Vespero:

La Loka Kongresa Komitato decidis okazigi dum la Kongreso Muzikan Vesperon kun ĉielarka prezento de klasika kaj moderna muziko kun koncernaj kantoj en Esperanto.

Gazetara Servo:

La Kongresa Gazetara Servo komencis en marto la periodan dissendadon de informoj al germanaj kaj eksterlandaj gaze-

RADIO. Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, Paris 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondolongoj, vidu la aprilan numeron.

Radio Roma - 2-V, Tra Romo, Palatino, Imperiestraj Forumoj kaj Koloseo; 6-V, Itala folkloro en la Nacia Muzeo pri la popolaj tradicioj; 9-V, Leterkesto kaj bibliografio; 13-V, Ĉieliro de Jesuo; 16-V, la tago de bonvolo; 20-V, Italaj kanzonoj en Esperanto; 23-V, Vittorio Zignoli kaj la kablovojo de Aiguille du Midi; 27-V, Novajoj el Italujo; 30-V, Itala regiono Liguria. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto. Prelegantoj: D-ro Vincenzo Musella kaj S-ro Luigi Minnaja.

toj. La nekongreslandaj esperantistoj estas petataj sendi al la Kongreso eltondadojn de gazetartikoloj pri la Universala Kongreso en Mainz.

Honora Protektanto:

D-ro h.c. Peter Altmeter, Ministro-Prezidanto de Rejnlando-Palatinato akceptis esti la protektanto de la Universala Kongreso.

Statistiko:

(ĝis fino de marto) Algerio 2, Aŭstrujo 26, Belgujo 25, Brazilo 3, Britujo 124, Bulgarujo 9, Ĉeĥoslovakujo 1, Danlando 70, Etiopio 1, Finnlando 6, Francujo 253, Germanujo 491, Grekujo 1, Hispanujo 9, Hungarujo 6, Islando 6, Israelo 1, Italujo 72, Japanujo 2, Jugoslavio 45, Maroko 7, Meksiko 1, Monako 3, Nederlando 97, Norvegujo 27, Novzelando 4, Pollando 7, Portugalujo 2, Sudafriko 1, Svedujo 99, Svisujo 33, Urugvajo 1, Usono 10, Venezuelo 1. Entute 1447 el 33 landoj. (Pasintjare 869 el 33 landoj).

Konstanta Kongresa Sekretario
G. C. FIGHIERA

EN GRESILLON

Baldaŭ la Kastelo malfermos siajn pordojn por pli ol tri monatoj. Ekde la 15-a de junio, la Esperantistoj el la tuta mondo povos restadi en sia „hejmo”, kaj partopreni la diversajn kulturajn aranĝojn. Ni jam aperigis la ĝeneralan programon en „Esperanto”, kaj prezentis niajn „Kulturajn internaciajn Feriojn”, kun partopreno de Paul Neergaard, André Albault, René Watier kaj Pierre Bab'in (15-17 julio). Ni ankaŭ parolis

pri la tria periodo (27 julio-10 aŭg.), kiu celas instrui la francan lingvon al alilandanoj dank' al Esperanto.

Hodiaŭ, ni deziras mallonge prezenti la unuan periodon, t.e. de la 15-a de junio ĝis la 14-a de julio. Dum tiu periodo, lertega kaj sindona Samideanino, S-ino Haudebine, gvidos la Esperantajn aranĝojn. Ŝi nome okupiĝos pri kurso por komencantoj, kiel lastjare, kaj ankaŭ pri altnivelaj esperantistaj aktivajoj, laŭ la deziroj de la ĉeestantoj.

Dum la sama periodo oni akceptos en la Kastelo ankaŭ Esperantistojn — kaj Simpatiantojn — kiu deziras nur ripozi. En amikeca etoso ili ĝuos la bonan aeron de Anju, kaj la agrablajn promenadojn en la parko, kaj en la ĉirkaŭaĵoj. Ili povos, per takso aŭ privata aŭtomobilo, facile ekkursi al la proksimaj „Loire Kasteloj”, kaj regionaj vidindaĵoj. Ĉiujn dokumentojn kaj informojn ili ricevos en la Esperantista Kulturdomo.

Por la vesperdistroj, ĉiu estas amike petata prezenti ion pri sia lando aŭ pri iu ajn temo. La Kastelo disponigas al la gastoj magnetofonon kaj aparaton por prezenti lumbildojn.

Por permesi baldaŭan starigon de programo oni sin anoncu kiel eble plej frue al la Esperantista Kulturdomo, Kastelo de Grésillon — *Baugé* (Maine-et-Loire). Francujo.

Ni atentigas niajn legantojn, ke la internaciaj porinstruistaj kaj porĵejnulaĵoj vojaĝoj anoncitas sur la kovrilo de nia marta numero NE estas nur por instruistoj aŭ junuloj, sed por ĉiuj esperantistoj. La dato por aliĝo estas prokrastita ĝis la 15a de majo 1958.

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1958

Stato je la 31-a de marto 1958.

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Brazilo	7011	5699	81.27
2.	Svedujo	6945	5640	81.21
3.	Britujo	6963	5598	80.40
4.	Nederlando	5567	4130	74.19
5.	Usono	3225	2320	71.94
6.	Germanujo	6865	4882	71.14
7.	Svislando	2185	1535	70.25
8.	Francujo	7647	5305	69.37
9.	Belgujo	1907	1267	66.44
10.	Finnlando	2765	1835	66.36
11.	Danlando	2743	1725	62.89
12.	Hispanujo	2508	1570	62.60
13.	Pollando	6150	3225	52.44

14.	Norvegujo	2144	1115	52.—
15.	Jugoslavio	3800	1835	48.29
16.	Italujo	4030	1265	31.39

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Israelo	240	230	95.83
2.	Aŭstralio	1228	1165	94.87
3.	Portugalujo	560	495	88.40
4.	Kanado	440	385	87.50
5.	Japanujo	1280	1005	78.57
6.	Sudafriko	235	145	61.70
7.	Aŭstrujo	1505	850	56.48
8.	Maroko	659	355	53.87
9.	Novzelando	955	505	52.88
10.	Urugvajo	414	200	48.31
11.	Islando	315	85	26.98
12.	Argentino	1005	140	13.93

6-a nacia kongreso
ESPERANTO-LIGO]
por
NORD-AMERIKO

okazos en San Diego, Kalifornio (Usono) la 10-13an
de julio, 1958

Oficiala adreso:
P.O. Box 6215, San Diego 6, Kalifornio, Usono

REAPERANTOJ

de Henrik IBSEN

ludota dum la Kongreso en Mainz

Konatiĝu kun ĝi jam antaŭe!

Ĉetante ĝin vi subtenas la kreon de Internacia
Teatra Trupo Esperantista. Prezo: 0.75 gld. 3 steloj
Mendu ĝin ĉe U.E.A.!

BELARTO

APERINTA !!

Belega kajero, unika en la Esperanto-literaturo.

Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A.

Prezo: por membroj 2.75 gld. 11 st.,
por nemembroj 3.25 gld. 13 st.

WORLD STUDENT NEWS

étudiants du monde

WELTSTUDENTENNACHRICHTEN



Tri nomoj sed unu gazeto. Ĝi havas ankaŭ
aliajn nomojn, en la hispana, araba kaj rusa.
Ĝi estas tia gazeto — universala, respegu-
lanta la tutan variecon de la studenta mondo.

Ĉiumonata, ilustrita, artikoloj pri studenta
movado, sporto, humuro, kulturaj notoj,
plumamikoj kaj konkursoj. Ĉiuj plej gravaj
studentaj problemoj — kunlaborado, kolo-
niismo, studkondiĉoj kaj reformado de
edukado.

Skribu petante senpagajn provekzemplerojn
kaj detalojn pri abono

WSN, Vocelova 3, Praha 2, Ĉeĥoslovakio

Helsingör

La internaciaj feriaj
Esperanto-kursoj
okazos

★ **19-26 de Julio**

Prospekto pri ili
senpage havebla ĉe

L. Friis - Ingemansvej 9,
A a b y h ø j, Danlando

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de
Prof. G. Waringhien
kun kunlaborado de
la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton
32/40 paĝa - - poŝformato
jare fr. fr. 400.- aŭ egalvaloro

Ricevas la abonojn:
En Francujo: R. Fiquet, Poŝta
konto 2259-98 Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj
landaj Perantoj de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON
Redakcio: Administracio:
7, Av. Léon-Gourdault 5, Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)

Francujo.

Mi proponas du el la libroj:
**BIBLIOGRAFIO
DE INTERNACIA LINGVO**
de P. E. Stojan'

**HISTORIO
DE LA MONDOLINGVO**
de E. Drezen

**A SHORT HISTORY
OF THE INTERNATIONAL
LANGUAGE MOVEMENT**
de A. L. Guérard

en interŝanĝo por la libro kiun
mi serĉas:

**HISTOIRE DE LA LANGUE
UNIVERSELLE**
de L. Couturat, L. Leau

Skribu al: Anésio Lara, P.O.
Box 1431, São Paulo, Brazilo.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam